

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

První politická brožura v esperantu

(Vzpomínka a příspěvek k dějinám českého esperantismu.)

Krvavá tragédie v Černové 27. 10. 1907 — kde maďarští žandarmi stříleli do slovenského lidu při svěcení kostela, který si tento lid sám ze svých peněz postavil — ukázala nadmíru jasně, že maďarští páni Uher jsou odhodláni užití všech nejkrajnějších prostředků, aby úplně vyhubili malý nešťastný národ slovenský. Útisk a barbarské řádění maďarské džentry proti nemaďarským národnostem v Uhrách na konci minulého a na začátku tohoto století, zřejmě úsilí o jejich vyhubení, stupňovaly se tak úděsnou měrou, že to vyvolalo pozornost a protesty nejušlechtilejších obránců lidských práv. Hřímavá slova slavného norského básníka Björnstjerne Bjørnsona, pečlivé doklady prof. R. W. Setona-Watsona (Scota Viatora), britké kritiky red. H. W. Steda, plamenná parlamentní řeč českého soc. demokrata dra Františka Soukupa a bouřlivě ukazovaly na veliký zločin proti přírodě a lidskosti páchaný Maďary na Slovácích. K těmto protestům připojili se i esperantisté celého světa. Stalo se tak na popud českých esperantistů, neboť tehdy jak na půdě parlamentní tak na tribuně veřejnosti za zmučené Slováky mluvili a bojovali Češi.

Dva čeští vysokoškoláci — posluchač práv jako nakladatel, posluchač filosofie a techniky jako autor, oba tehdy »čtyřletí« esperantisté — vydali koncem r. 1907 (s vročením 1908) brožuru »Slovakoj kaj Magiaroj. Kelkaj vortoj pri slovaka suferado en Hungario«, k níž byl přiložen esperantsko-francouzský protest proti útisku Slováků, adresovaný baronu Al. Aehrenthalovi, tehdejšímu rakousko-uherskému ministru zahraničí. Esperantisté celého světa byli vyzváni, aby s obsahem brožury seznamovali své esperantské i neesperantské okolí a aby sbírali podpisy na přiložené protestní archy a ty zaslali do Vídně. Podkladem brožury byla proslulá řeč »K svědomí Evropy« českého poslance dra Frant. Soukupa na říšské radě vídeňské, vydaná v brožurce o mnohatisícovém nákladu, takže zburcovala celý český národ (tím se vysvětluje poněkud vášnivý tón brožury autorů jinak velmi střizlivého).

Někteří obětaví čeští esperantisté kupovali brožuru v desítkách výtisků a rozeslali ji svým zahraničním přátelům. Brožura byla v celku i v obsírných nebo stručných výtazích v originále (Espero katolika) i v překladech (rumunsky, finsky, dánsky, polsky, chorvatsky, katalánsky, korejsky a j.) přetiskována, bylo o ní referováno na schůzích esperantistů i neesperantistů, v esperantu i v jazycích národních. Nejpozoruhodnější z těchto schůzí byla protestní schůze v anglickém přístavním městě Blackpoolu, kde na společné schůzi všech místních spolků esperantisté anglicky referovali o obsahu brožury a zástupci všech zúčastněných spolků podepsali a odeslali do Vídně společný protest. Podobná schůze konala se na druhém břehu oceánu v kanadském Montrealu, kde tehdy esperantisté byli nečetní, ale velice čili a podnikaví. Tak se císař. a král. ministerstvo zahraničních záležitostí a císařského domu i sám pan ministr bar. Aehrenthal prakticky seznamovali s esperantem. Nutno si uvědomiti, že tato akce probíhala za velikého mezinárodního politického napětí v Evropě (za balkánské krise v roce 1908) a proto není bez zajímavosti, že iniciátoři neměli žádné nepřijemnosti s rakouskými úřady.

Tak dva pražští studenti — dnes ovšem oba již pensionovaní uč. ředitelé města Prahy — a několik obětavých a horlivých českých esperantistů (z nichž zvláštní zmínky zasluhuje velmi obětavý a horlivý otec známého prof. dra Alex. S. Batak) vyvolali nevelké, ale pozoruhodné mezinárodní hnutí na obranu lidských práv, ukázali činem, že mezinárodní jazyk možno uplatnit i v práci národní, že neutrální jazyk může být účinným činitelem v politickém boji za pravdu a spravedlnost, při čemž nijak nezáleží na počtu esperantistů — těch nebylo tehdy mnoho — ale na jejich pospolitosti, součinnosti a roztroušenosti ve všech koutech světa. Že i čin tak dobře míněný a úspěšně provedený provázal také smutný zjev u Čechů obvyklý, buďž pomínuto se shovívavým mlčením.

Bylo to před čtyřiceti lety a je to už dávno zapomenuto.

R. B.

Fr. VI. Lorenz daŭre aktiva

En la tria militjaro (1941) aperis en Rio de Janeiro libro, kiu speciale interesas ĉefajn esperantistojn. Estas »Diverskolora bukedeto« kun la subtitolo »Poemoj kaj poemoj tradukitaj el 40 lingvoj« de Francisco Valdomiro Lorenz. Ni, la samgentanoj de lia estinta patrujo, estimas lin, kiel unuan pioniron de esperantismo en niaj landoj, kies »Plena lernolibro de la Lingvo Internacia por Bohemoj« aperis en Pardubice en 1890, do jam en la tria jaro post la publikigo de la Zamenhofa projekto de artefarita lingvo.

Lian naskiĝtagon ni ne sukcesis trovi, sed li estas nun ĉirkaŭ okdekjara. La lernolibron li verkis kiel laboristo. Baldaŭ poste li fariĝis suspekta al tiama aŭstria polico pro socialisma kaj patriota agado, ĉar li partoprenis en tiama movado de »Junularo« (Omladina). Li fuĝis kaj elmigris Brazilon, kie li de post 1896 loĝis en São Feliciano kaj daŭre partoprenis la movadon. Li aprobis la reformojn idistajn, sed kiam li konvinkiĝis, ke granda plimulto de esperantistoj malakceptas ilin, li deklaris sin fidela al Esperanto kaj kiel dokumenton li publikigis en Bohema Esperantisto 1910 originalan artikolon (»Deveno de la maizo« laŭ legendo de guarianaj indianoj; B. E. V. p. 39.) Kunlaboris en literatura parto de L'Esperantiste (1898—1908). En 1909 aperis lia traduko: »Kanto de l'Ekzilo«, Poezio de Gonçalves Dias. Esp. traduko de Fr. V. Lorenz. Eldono de Brazilia Ligo Esperantista. En jaro 1914 li redaktis »Astro idista. Dumonata revueto. São Feliciano«. En 1930 li deklaris en letero al Antido, ke li rezignas je laborado pri sia projekto Mundial kaj ke li kunlaboros por »Nov-Esperanto«, kaj en 1933 li estis proklamita kiel unu el 7 »fondantaj membroj« de la »Nov-Esperanta-Akademio«, prezidata de R. Saussure.

Despli surpriza estas la apero de lia ĵus menciita poemkolekto. En la antaŭparolo sciigas nin ĝia redaktinto Ismael Gomes Braga pri kelkaj cirkonstancoj, kiuj kompletigas niajn sciojn pri tiu vivo ekster serio. Li skribas, ke profesoro Lorenz verkadis en Brazilo dum jardekoj nur en portugala lingvo, ne povante trovi eldoniston por esperantaĵoj. Ĝis nun li verkis 16 gravajn librojn kaj tradukis en la portugalan proksimume 20 seriozajn volumojn. Lia vere grava verko estas »Inicição Linguística« (Lingvistika iniciado), aperinta 1929 en impona volumo, riĉa je kliŝoj. Tiu ĉi verko donas al Lorenz — skribas Braga plue — grandan aŭtoritatecon pri lingvaj aferoj. En tiu libro li detale studas la naturajn lingvojn, kaj en fino li pledas por lingvo artefarita kaj diskutas pri la ĉefaj projektoj: Universal Glot, Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, kaj evidentiĝas la superecon de Esperanto.

Estas menciinde ankaŭ tio, ke la amikoj de Lorenz, volante memoriĝi la oran jubileon de lia unua ĉeĥa lernolibro, fondis en Santos en la jaro 1940 Esperantistan Grupon »Francisco Valdomiro Lorenz«.

Domage, ke el la libro ni ekscias nenion plu el la sendube riĉa kaj plena vivo de nia ŝatata

samgentano. Do ni lasas almenaŭ nin impresi per lia verko.

La redaktinto Gomes Braga kolektis liajn versajn tradukojn, kiuj dum la paso de l'tempo sporade aperadis en gazetoj kaj revuoj; kaj Lorenz almetis ankoraŭ kelkajn pluajn, ĝis nun nepublikitajn, kaj kelkajn originalaĵojn. Tiel naskiĝis la volumo kun modesta titolo »Diverskolora bukedeto«. La formato de la libro estas 18×12 cm, paĝoj 160, prezo nemontrita. La lingvoj, el kiuj devenas la tradukaĵoj, estas la jenaj: portugala, hispana, franca, itala, kataluna, rumana, provencala, latina, antikva greka, novgreka, angla, germana, holanda, dana, sveda, rusa, pola, ĉeĥa, slovaka, serba, kroata, bulgara, ukraina, blankrusa, latva, litova, sanskrita, palia, cigana, armena, persa, hungara, estona, araba, japana, ĉina, baska, majaa, tupia, gvarania, keĉua. Estus sciinde, el kiuj lingvoj Lorenz tradukis senpere, kaj el kiuj nur pere de alilingva interpreto.

Plej riĉe estas reprezentita la lingvo de lia nova patrujo, nome la portugala, ĉar el ĝi estas 14 poemoj sur 36 paĝoj. Poste sekvas la lingvo de lia origina patrujo, nome la ĉeĥa: el ĝi enestas 3 kantoj kaj 8 poemoj sur 12 paĝoj. Temas pri la jenaj aŭtoroj: Jan Kollár (La vero); Fr. Lad. Čelakovský (Larmoj kaj sopiroj); Vítězslav Hálek (La printemp' alvenis); Jos. Václav Sládek (Ne forgesu!); Ant. Klášterský (La lukto de genio); Jaroslav Vrchlický (En mia koro; La vivo); Miloš Červinka (Pluvis la floroj); Karel Dostál-Lutinov (Kristo-Plugisto). El la slovaka lingvo estas tradukitaj kvar kantoj. La aliaj lingvoj estas reprezentitaj per unu—du, malofte pluraj tradukaĵoj.

Ni jam diris, ke la volumo estiĝis nesisteme, el publikaĵoj en gazetoj kaj revuoj. Tial oni ne miru, se la elekto de la materialo aspektas hazarda kaj ne montras la kulminon de la respektivaj naciaj poezioj. Kaj tamen unu komuna trajto ŝajnas evidentiĝi: Estas konscia revenado al malnovaj temoj kaj aŭtoroj. Antikve aspektas ankaŭ la tipografia aranĝo de la kovrilo kun frape simbola bildo de terglobo kaj radianta verda stelo.

Sed ankaŭ la formo de la esperanta teksto rememorigas pri pasintaj tempoj: Estas solida zamenhofa lingvo, malatentanta la modernismon de la »budapesta skolo«. (Kiu ĉe tia okazo ne ekpensus pri la »Eterna bukedo« de Kalocsay kun tradukoj de poeziaĵoj el 24 lingvoj sur 350 paĝoj!) Lorenz evitas neologismojn, krom la teknikaj terminoj de la indiĝenaj armiloj, instrumentoj kaj simile, kiuj tamen estas ĉiam detale klarigitaj. Unu interesan neologismon ni trovas en la libro: saŭdado. Laŭ la klarigo de la eldoninto temas pri melankolia stato de pasia amanto, do eble ĉeĥe »teskné toužení«.

Koncerne la ritmon ŝajnas al ni, ke estus oportune, pli respekti la konkeraĵojn de la moderna esperanta poetiko. La leganton precipe ĝenas la ofta stumblo sur nekonvena loko (du amfibrakoj anstataŭ tri trokeoj).

Oni ankaŭ ne devus preteratenti, ke la sukksrimoj (adasismoj), kiuj estis pravigeblaj en la primitivaj tempoj de la esperanta poezio, nun estas malaprobataj. Nun oni jam sentas ĝena, legante strofojn, kie svarmas malgrasaj rimoj —adi —adi, —iĝi —iĝi.

La redaktinto skribas en la antaŭparolo, ke li en ĉi tiu kolekto intencis libroforme konservi la verkojn aperintajn en revuoj kaj gazetoj. Tiukaze la leganto ŝatus pli detale scii, el kie estas la poemoj represitaj.

Sed ni ne estu bagatelemaj. La verko de Lorenz estas leginda ne nur pro la sentimentaj mo-

tivoj, kiujn havas ni ĉefoj al nia unua pioniro. Ni represos kelkajn specimenojn el lia libro por pruvi tiun aserton. Hodiaŭ ni represas tradukojn de la poemo de Karel Dostál Lutínov »Kristo — plugisto«, kaj de slovaka kanteto »Maljuna fraŭlo«.

Ni sincere ĝojas, retrovinte la nomon Lorenz, kiu ne estas forviŝebla el la historio de la ĉefa esperantismo, ree sur la scenejo. Sed ekde la tempo, kiam aperis lia Diverskolora bukedeto, ree pasis ses jaroj. Ni esperu, ke tio ne estis la lasta okazo, kiam ni pri li aŭdis.

Dr. T. Pumpr.

Ridindaj ludemuloj

Neniu neas, ke Esperanto, kiel ĉiu homa verko kaj kiel ĉiu lingvo en la mondo, havas kelkajn mankojn kaj malfacilaĵojn. Sed ĉiu bone scias, ke Esperanto eĉ kun siaj mankoj kaj malfacilaĵoj kontentige plenumas ĉiujn bezonojn de la internacia lingvo kaj plene sufiĉas al la nuna homaro por bezona kaj necesa interkompreno inter nacioj, estante jam vere vivanta lingvo, kapabla nature evoluiĝi sen perfortaj ŝanĝoj kaj reformoj.

Ĉiu bone scias, ke Esperanto estas la plej simpla kaj facila lingvo el ĉiuj vivantaj lingvoj naturaj (naciaj) kaj artefaritaj (internaciaj), kaj ke ĝiaj mankoj kaj malfacilaĵoj estas negrandaj kaj nemultaj, krom tio oportune tolereblaj kaj facile forigeblaj, se la veraj uzantoj de Esperanto tion trovas aŭ oportuna aŭ bezona aŭ necesa (tiu kazo ĝis nun ne venis). Ĉiu ankaŭ bone scias, ke neniu forlasas Esperanton pro ĝiaj realaj aŭ ŝajnaj eraroj, sed pro tute aliaj kaŭzoj, kaj ke neniu reformo gajnus amasegon da novaj partianoj kaj venkon ĉe la registaroj.

Sole saĝegaj konkurantoj al Esperanto naive kredas, ke ilia idolo estas absolute senmanka, sendifekta, perfekta, definitiva kaj, dio scias, kia — sed tion kredas eĉ ne ĉiuj, sed sole la plej naivaj kaj ridinde fanatikaj partianoj de tiaj dubindaj miraklaĵoj. Reale pensantaj kaj praktike spertaj homoj prudente komprenas, ke neniu aposteriora lingvo, havanta sian esencan bazon en naturaj, treege neperfektaj, lingvoj, povas esti absolute perfekta, ke absolute perfekta (sed neniel facila, precipe por la popolo) lingvo povus esti sole aprioria filozofia lingvo, bazanta sur kompleta fermita filozofio, science solvinta ĉiujn problemojn pri la mondo kaj pri la vivo, kia filozofio, bedaŭrinde, ĝis nun ne ekzistas. Ili ankaŭ scias, ke tia absoluta perfekteco de la lingvo ne estas necesa kondiĉo de la sukceso, ke sufiĉas relativa perfekteco, respondanta al la bezonoj de la plej proksimaj jarcentoj.

Ĉar la kvalitoj de Esperanto plene respondas al la nunaj kaj al la plej proksimaj bezonoj de la homaro, ĉar samtempe Esperanto estas sendube la plej simpla kaj la plej facila el ĉiuj lingvoj, kaj ĉar Esperanto nature evoluiĝas kaj perfektigigas kiel ĉiu vivanta lingvo, oni rajtas rigardi Esperanton kiel vera solvo de la problemoj pri

internacia lingvo por la plej proksimaj jarcentoj. Solvi la problemon por la venontaj jarmiloj ne estas zorgo kaj tasko de la nuna homaro, ĉar la venonta homaro iros sian propran vojon, kiel ni hodiaŭ iras la nian.

Esperanto kontentige, se ne absolute perfekte, solvas la urĝan problemon pri la internacia lingva demokratio. Ĝia venko ne estas en la manoj de registaroj, sed de la popoloj. La registaroj sole registros kaj leĝigos la decidon de la popoloj. Malplej helpas al la ideo homoj, por kiuj internacia lingvo ne estas bezono de praktika vivo kaj uzo, sed objekto de interesaj, tamen neutilaj, lingvaj vortludetoj, tiuj ridindaj ludemuloj, serĉantaj senĉese novajn reformojn kaj pli perfektajn sistemojn anstataŭ uzi la lingvon mem kaj labori per ĝi kaj en ĝi en konvinko, ke la lingvo mem ĝenerale estas treege malperfekta ilo de homa interkompreno. Tial la ampleksa verko de prof. W. I. A. Manders (»Vijf kunsttalen«) povas havi sole teoriantan, historian kaj instruantan (por neinformitoj pri la teorio kaj historio de la interlingvistiko), sed absolute ne niun praktikan valoron.

Ĉion ĉi povus scii ankaŭ sinjoroj Manders kaj Teo Jung.

Se sinjoro Manders ĉiuforte sentas la bezonon reformi, li povas perfektigi la plej pretendeman projekton occidental aŭ — muskaptilon. Se li ĉiuforte volas verki dikan libron pri la interlingvistiko, li povas havigi al la esperantistaro esperantan verkon pri la teorio kaj historio de la internaciaj lingvoj aŭ ian alian utilan lernolibron, sed li faru nenion senutilan kaj senbezonan! La danko pro tiu ĉi sincera konsilo estas nek postulata nek atendata. HKB

MALJUNA FRAŬLO

(Slovaka kanteto.)

*Ĉiuj edziĝas,
nur mi ne;
jaroj perdiĝas
al mi, ve!*

*Ĉiuj edzinon
havas jam,
mi nur bastonon
en la man^o.*

(Traduko de Fr. Vl. Lorenz en la poemkolekto Diverskolora bukedeto.)

O. Ginz: Pri la komencoj de la ĉeĥa libropreso

Johano Gutenberg estis sendube la unua presisto en Eŭropo, sed oni ne povas bone nomi lin la inventisto de libropreso, kvankam li estas konsiderata kiel tia depost tempoj plej malnovaj. Estas certe, ke la fandon de la unuopaj literoj, la fundamenton de la libropresado, efektiviĝis jam antaŭ li Coster el Haarlem. Estas diversaj rakontoj kaj supozoj pri tio, laŭ kiuj vojoj eksciis pri tio Gutenberg, kiu la nederlandan manieron tre perfektigis.

La devenon mem de la libropreso ni devas serĉi en Ĉinio, de kie venis ankaŭ la eltrovo de papero. En la jaro 105 post Kristo nomis la ĉina registaro sian ministron de agrikulturo Cai-Lun nobelo pro lia eltrovo de papero, kiu multe helpis dum tiama manko de silko. Kiel inventinton de la presado oni devas konsideri la ĉinan forĝiston kun nomo Pi-Sung, kiu fabrikis dum la epoko Sung (381—388) moveblajn tipojn, nomatajn ho-pan, tio estas vivaj platoj. Novaj mencioj pri la libropreso en Ĉinio devenas de la jaro 1272, kiam dum la regado de dinastio t. n. »suda« Sung aperis libroj, presitaj per kupraj literoj.

Estas konate, ke la nederlandanoj estis unu el la unuaj eŭropaj nacioj, kiuj vojaĝis en malproksima oriento kaj ni komprenas, ke ili povis alporti en sian hejmon informon pri la ĉinaj presistoj.

Al Gutenberg tamen apartenas la merito, ke li komprenis la signifon de tiu ĉi eltrovo kaj ke li enkondukis ĝin en la vivon de okcidento. El lia laborejo eliris eble jam en jaro 1455, sed certe en jaro 1459, la unuaj presitaj verkoj de la mondo, la famaj 42- kaj 36-liniaj biblioj, la unuaj presitaj produktoj, kiujn oni povas nomi laŭ nuna koncepto libroj.

Pli prave ol laŭ iu ajn alia pruvo, oni povas dokumenti la ŝtupon de antikva klereco de la popoloj laŭ la tempo, kiam ili ekokupis sin pri la granda eltrovo de la libropreso kaj kiam ili mem komencis presi librojn. En tiu ĉi afero estas vico de ĉefoj inter la unuaj nacioj de la mondo laŭ la frutempo de la unua preso kaj laŭ ĝia enhavo.

Jam en la jaro 1468, do 9 jarojn post la finpresado de la 36-linia biblio Gutenberga, forlasas la ĉeĥan presejon ĝia unua verko, la Kroniko de Trojo, kiu estas do la unua libro, presita en ĉeĥa presejo.

Ĝi estas libro de kortuŝa simpleco, bildo de niaj tiamaj malriĉaj cirkonstancoj, kiu neniel povas sin kompari kun la pompaj presverkoj de la riĉaj popoloj. Tamen estas sen dubo interese,

ke la unua konata ĉeĥa libro presita ne estas de enhavo religia. Ĝi estas grava pruvo pri la intereso de tiama legantaro en nia lando.

Antaŭuloj de Kroniko de Trojo estis sole presitaj libroj germanaj kaj italaj. En Francio oni komencis presi post ni, en la jaro 1469, en Nederlando en 1473, hispanoj en la jaro 1474 kaj la unua presita libro angla estas el la jaro 1477.

Ĉe ni estas konataj 6 presejoj el la XV-a jarcento: en Plzeň, Praha, Kutná Hora, Vimperk, Brno kaj Olomouc. Baldaŭ post la jaro 1500 ekestis pliaj presejoj en Litomyšl, Mladá Boleslav kaj en Bělá pod Bezdězem.

Grandan parton de siaj produktoj liveris tiamaĵaj presejoj por la bezono de la eklezio, kiu povis pagi la ne malgrandajn kostojn de la preso. Ni havas Novan testamenton el la jaro 1475, Sinodan statuton de ĉefepiskopo Ernesto el la jaro 1476 kaj ĝis la jaro 1500 kelkajn pliajn eldonojn de Nova testamento, Meslibroj, Pasionaloj, Psalteroj kaj de aliaj libroj ekleziaj. Kompletan biblion en ĉeĥa lingvo ni havas presitan antaŭ la jaro 1500 dufoje: en la jaro 1488 en Praha kaj en jaro 1489 en Kutná Hora.

Por tiu ĉi celo oni presis ankaŭ en eksterlando, ĉefe en Venezia kaj Nürnberg, kiam ne sufiĉis niaj presejoj.

Kvankam estis garantiita la vendo tiam ĉe ni kiel en landoj aliaj pleje al libroj religiaj, ni havas tamen fruajn librojn ĉeflingvajn ankaŭ de enhavo alia. Aperis ekzemple: nova eldono de la Kroniko de Trojo en la jaro 1487, Fabloj de Ezopo kaj Kroniko de Romo en 1488, Libroj medicinaj en jaroj 1492, 1496 kaj 1497, Polica ordo en 1492, Vivo de Mohamed en 1498, mezepoka poemo studenta Stalisto kaj studento kaj libroj aliaj. La unua ĉeĥa kalendaro estis presita en jaro 1485, la unua gazeto en ĉeĥa lingvo en jaro 1513. La unua ĉeĥa aboco-libro, eldonita en Prostějov en jaro 1547, estas verŝajne la unua aboco-libro en la mondo entute.

Kvankam ni estis nacio progresema kaj avida kleriĝi, ni tamen estis same kiel ni estas ĝis nun nacio laŭnombre malgranda kaj neniam ni estis lando riĉa. Al tiuj kaŭzoj ni devas kontribui, ke ĉeĥaj libroj en tempoj plej malnovaj ne povis esti tiel multnombraj kiel ĉe nacioj grandaj. Se ni krome konsideras la oftajn militojn, per kiuj estis niaj landoj turmentitaj kaj la religian persekuton, pro kiu devis fuĝi niaj eminentaj viroj (inter ili ankaŭ presistoj) en eksterlandon, oni devas koncedi, ke la nobla arto libropresista trovis en niaj landoj sufiĉan subtenon.

Marnavigadistoj kaj profesia honorsento

Ne ĉiu homoj havas, kiel oni ĉe ni diras, honorsenton en la korpo, dum aliflanke eĉ civitanoj neonestaj havas en la korpo sian honorsenton profesian. Ĝin havas diplomatoj same kiel kuiristoj, akaparuloj kaj aventuruloj. Ŝipkapitanoj kaj homoj „apudakvaj“ entute estas neimageblaj sen profesia honorsento. Oni scias ekzemple, ke reguloj de profesia honorsento fiksis al ŝipano la vicon dum forlasado de dronanta ŝipo: unue ratoj, plue pasaĝeroj — poste

ŝipanoj kaj la plej lasta la ŝipkapitano. En pasinteco ne unu homo perdis sian okupon sole pro tio, ke li ne atentis la regulojn de profesia honorsento. Certe same kiel manko de neatento al tiuj reguloj kaŭzis perdon de okupo al unuopa navigadisto, tiel oni scias el la historio de mara kaj rivera navigado pri multaj heroaĵoj de famaj ŝipanoj kaj navigadistoj, kaŭzita sole kaj nur pro honorsento profesia.

Mi mem scias pri unu tia heroaĵo, kaj ĉar la heroaĵoj devas servi kiel ekzemplo al estontaj generacioj kaj ne devas esti forgesitaj, estas konvene tiun ĉi heroaĵon de ĉeĥa navigadisto laŭdece priskribi.

Jarda Kuliĉek ne estis kompreneble marnavigadisto, ĉar provizore en Bohemio maro ne ekzistas. Li posedis koncesiitan pramhaltejon sur rivero Labe kaj apartenis do ankaŭ al homoj „apudakvaj“, eĉ se la akvo estis malgranda. Kuliĉek ne estis jam homo juna kaj li diradis, ke la tuta respubliko starus en ombro, se por ĉiu homo de li dum lia vivo transportita, ekzistus unu arbeto. Neniam okazis, ke li rifuzis iun transporti. Sed kiam en la jaro 1939 invadis nian landon germanoj, diris al si Kuliĉek, ke la germanojn li ne transportos kaj sen longa pripensado li forlasis sian hejman pramhaltejon kaj fuĝis el Bohemio. Post longa pilgrimado li fine venis en Mezan Orienton kaj aliĝis al ĉeĥoslovaka militista trupo, kiu ĵus estis formiĝanta en Palestino. Kun tiu ĉi trupo li venis ankaŭ ĝis sieĝita Tobruk, sed ne restis tie longe kaj pro ia malsano li estis evakuita en Palestinon, kie estis rezerva trupo. Nu kaj tie li sin dediĉis al kuracado. Komence li sin kuracis kiel decas kaj konvenas al malsana homo, sed kiam lia stato pliboniĝis kaj li ricevis elirpermeson, li komencis kuraci sin per vino kaj unu vesperon faris tion tiel ĝisfunde, ke en unu Haifa gastejo li kaŭzis eksceson, kian neniu memoris. Post tiu esprimo de superabunda energio, lia tempo de resaniĝanto estis ĉesigita kaj oni decidis, ke la bona Kuliĉek uzu tiun ĉi energion kontraŭ germanoj en la ballinio. Antaŭ ol oni lin lokigis sur ŝipo, kiu transportis al Tobruk helpajn trupojn, li ricevis de la komandanto de ĉeĥoslovaka ekzerc-centro en Haifa fermitan koverton, adresitan al komandanto de Kuliĉek-taĉmento en Tobruk,

kun ordono, transdoni la leteron post la alveno al sia komandanto.

La navigado el Haifa al Tobruk dum tiu tempo ne estis afero agrabla, kiel Kuliĉek mem dum sia vojaĝo konvinkigis. Preskaŭ precize en tagmezo de la dua tago lia ŝipo estis torpedita, kio kaŭzis grandan haoson, ĉar la ŝipo tuj post eksplodo kliniĝis flanken kaj malrapide subakvigadis. En la momento de eksplodo Kuliĉek provadis sur si efikon de sunaj radioj kuŝante sur la ferdeko en unu de savflosoj, kiuj estas sur ŝipoj dum milita tempo. Kiam Kuliĉek post la eksplodo rekonsciigis el unua konsterno, li ekhavis du zorgojn; la unua penso kompreneble estis, kiel sin savi, sed li tuj ekmemoris, ke en subferdeko ie inter sia alia havaĵo li havas oficialan leteron, kiun li devas transdoni al sia komandanto. En tiu momento kaptis lin la profesia honorosento kaj anstataŭ, ke li penu sin savi, li kuris al la kajuto kaj efektive li sukcesis savi la leteron. Kun grandega feliĉo li ĝustatempe atingis la ferdekon, saltis kiel unu el la lastaj en la maron, kaj eĉ tie lin la feliĉo ne forlasis, ĉar post nelonge li estis savita viva kaj sana kaj la saman nokton alia ŝipo lin transportis al Tobruk.

Kiam matene li atingis sian trupon, kiu staris en Tobruka perimetro, li prezentis sin ĉe sia komandanto kaj post priskribo de sia aventura vojo li, kun ne malgranda fiero, transdonis al sia komandanto la leteron, kiun li kun vivdanĝero savis el la dronanta ŝipo. La letero tekstis: Mi punas la soldaton J. Kuliĉek pro sendisciplina konduto kaj kaŭzita granda eksceso per monpuno de unu palestina funto, kiu estu de lia soldata salajro dekalkulita. Subskribita: subkolonelo XY.

Verkis Denasterling. El la ĉeĥa tradukis F. S. el Zeměpisný magazin II/11-12.

KRONIKO ENLANDA

Ota Ginz. Ni uzas lian 51-an naskiĝtagon por paroli pri viro ekstreme modesta kaj ekstreme laborema. Ota Ginz naskiĝis la 19-an de julio 1896 en Ždánice. Depost 1918 li partoprenas aktive nian movadon en fakoj tre diversaj. En



ĉiuj li sukcesis. Versimile pro laboremo kaj pro talento. Li mem rigardas kiel aparte respektindan sukceson organizon de la Gazetara servo, kiun li komencis sisteme prilabori en jaro 1920 kaj nur pri jaro 1932 li povis raporti pri 1089 artikoletoj en 227 gazetoj. En la jaro 1936 estis 2150 artikoletoj en 325 gazetoj. Ankaŭ lia iniciato estis stacidomaj tabuloj, kiuj en 1937 pendis en 79 lokoj. Estis li, kiu estis direktoro de Radio-komisiono, kiam ni komencis klopodi pri enpenetro de Esperanto en Radio-sferon. Ankaŭ en esperantista filatelo li multon organizis. Kaj liaj iniciatoj pri komercaj informoj kaj interŝanĝoj de varoj helpe de Esperanto ne estos baldaŭ forgesitaj. Multajn jarojn li estis nia ĝen. sekretario, poste vicprezidanto. Sed por li funkcio akceptita neniam signifis titolon: homo konscia pri deo ne sukcesis neplenumi pli ol oni rajtis atendi de li. Kiam ni decidis klopodi pri ricevo de librovendista koncesio, estis li, kiu estis plej persista en agado kaj kiu ankaŭ trovis taŭgajn ejojn kaj taŭgajn personojn por tiu vendejo, ekirinta ekde januaro 1938.

Do ŝajnas, ke tiu viro dediĉas siajn fortojn ekskluzive al organizado. Sed tio ne respondus al spertaĵoj. Ŝajnas, ke lia plej grava eco estas penso. Li scias enprofundiĝi en haoson de homaj ideoj por ordigadi ilin komprenigante la ideojn al si kaj al la aliaj. Li fariĝis funda scianto de Esperanto; kaj scianto pri literaturo ĝenerale, pri internaciaj problemoj kaj pri problemo nacieca; tial li verkas. Ne por esti verkisto, sed por servi al ideoj tre diversaj. En j. 1927 li publikigis Radioamatoran vortaron kvinlingvan (esperanta, ĉeĥa, germana, franca, angla). En 1929 aperis lia ĉeĥa traduko el esperanta teksto

Mi mem scias pri unu tia heroaĵo, kaj ĉar la heroaĵoj devas servi kiel ekzemplo al estontaj generacioj kaj ne devas esti forgesitaj, estas konvene tiun ĉi heroaĵon de ĉeĥa navigadisto laŭdece priskribi.

Jarda Kulíček ne estis kompreneble marnavigadisto, ĉar provizore en Bohemio maro ne ekzistas. Li posedis koncesiitan pramhaltejon sur rivero Labe kaj apartenis do ankaŭ al homoj „apudakvaj“, eĉ se la akvo estis malgranda. Kulíček ne estis jam homo juna kaj li diradis, ke la tuta respubliko starus en ombro, se por ĉiu homo de li dum lia vivo transportita, ekzistus unu arbedo. Neniam okazis, ke li rifuzis iun transporti. Sed kiam en la jaro 1939 invadis nian landon germanoj, diris al si Kulíček, ke la germanojn li ne transportos kaj sen longa pripensado li forlasis sian hejman pramhaltejon kaj fuĝis el Bohemio. Post longa pilgrimado li fine venis en Mezan Orienton kaj aliĝis al ĉeĥoslovaka militista trupo, kiu ĵus estis formiĝanta en Palestino. Kun tiu ĉi trupo li venis ankaŭ ĝis sieĝita Tobruk, sed ne restis tie longe kaj pro ia malsano li estis evakuita en Palestinon, kie estis rezerva trupo. Nu kaj tie li sin dediĉis al kuracado. Komence li sin kuracis kiel decas kaj konvenas al malsana homo, sed kiam lia stato pliboniĝis kaj li ricevis elirpermeson, li komencis kuraci sin per vino kaj unu vesperon faris tion tiel ĝisfunde, ke en unu Haifa gastejo li kaŭzis eksceson, kian neniu memoris. Post tiu esprimo de superabunda energio, lia tempo de resaniĝanto estis ĉesigita kaj oni decidis, ke la bona Kulíček uzu tiun ĉi energion kontraŭ germanoj en la ballinio. Antaŭ ol oni lin lokigis sur ŝipo, kiu transportis al Tobruk helpajn trupojn, li ricevis de la komandanto de ĉeĥoslovaka ekzerc-centro en Haifa fermitan koverton, adresitan al komandanto de Kulíček-taĉmento en Tobruk,

kun ordono, transdoni la leteron post la alveno al sia komandanto.

La navigado el Haifa al Tobruk dum tiu tempo ne estis afero agrabla, kiel Kulíček mem dum sia vojaĝo konvinkigis. Preskaŭ precize en tagmezo de la dua tago lia ŝipo estis torpedita, kio kaŭzis grandan ĥaoson, ĉar la ŝipo tuj post eksplodo kliniĝis flanken kaj malrapide subakvigadis. En la momento de eksplodo Kulíček provadis sur si efikon de sunaj radioj kuŝante sur la ferdeko en unu de savflosoj, kiuj estas sur ŝipoj dum milita tempo. Kiam Kulíček post la eksplodo rekonsciigis el unua konsterno, li ekhavis du zorgojn; la unua penso kompreneble estis, kiel sin savi, sed li tuj ekmemoris, ke en subferdeko ie inter sia alia havaĵo li havas oficialan leteron, kiun li devas transdoni al sia komandanto. En tiu momento kaptis lin la profesia honor-sento kaj anstataŭ, ke li penu sin savi, li kuris al la kajuto kaj efektive li sukcesis savi la leteron. Kun grandega feliĉo li ĝustatempe atingis la ferdekon, saltis kiel unu el la lastaj en la maron, kaj eĉ tie lin la feliĉo ne forlasis, ĉar post nelonge li estis savita viva kaj sana kaj la saman nokton alia ŝipo lin transportis al Tobruk.

Kiam matene li atingis sian trupon, kiu staris en Tobruka perimetro, li prezentis sin ĉe sia komandanto kaj post priskribo de sia aventura vojo li, kun ne malgranda fiero, transdonis al sia komandanto la leteron, kiun li kun viddanĝero savis el la dronanta ŝipo. La letero tekstis: Mi punas la soldaton J. Kulíček pro sendisciplina konduto kaj kaŭzita granda eksceso per monpuno de unu palestina funto, kiu estu de lia soldata salajro dekalkulita. Subskribita: subkolonelo XY.

Verkis Denasterling. El la ĉeĥa tradukis F. S. el Zeměpisný magazin II/11-12.

KRONIKO ENLANDA

Ota Ginz. Ni uzas lian 51-an naskiĝtagon por paroli pri viro ekstreme modesta kaj ekstreme laborema. Ota Ginz naskiĝis la 19-an de julio 1896 en Ždánice. Depost 1918 li partoprenas aktive nian movadon en fakoj tre diversaj. En



ĉiuj li sukcesis. Versimile pro laboremo kaj pro talento. Li mem rigardas kiel aparte respektindan sukceson organizon de la Gazetara servo, kiun li komencis sisteme prilabori en jaro 1920 kaj nur pri jaro 1932 li povis raporti pri 1089 artikoletoj en 227 gazetoj. En la jaro 1936 estis 2150 artikoletoj en 325 gazetoj. Ankaŭ lia iniciato estis stacidomaj tabuloj, kiuj en 1937 pendis en 79 lokoj. Estis li, kiu estis direktoro de Radio-komisiono, kiam ni komencis klopodi pri enpenetro de Esperanto en Radio-sferon. Ankaŭ en esperantista filatelo li multon organizis. Kaj liaj iniciatoj pri komercaj informoj kaj interŝanĝoj de varoj helpe de Esperanto ne estos baldaŭ forgesitaj. Multajn jarojn li estis nia ĝen. sekretario, poste vicprezidanto. Sed por li funkcio akceptita neniam signifis titolon: homo konscia pri devo ne sukcesis neplenumi pli ol oni rajtis atendi de li. Kiam ni decidis klopodi pri ricevo de librovendista koncesio, estis li, kiu estis plej persista en agado kaj kiu ankaŭ trovis taŭgajn ejojn kaj taŭgajn personojn por tiu vendejo, ekirinta ekde januaro 1938.

Do ŝajnus, ke tiu viro dediĉas siajn fortojn ekskluzive al organizado. Sed tio ne respondus al spertaĵoj. Ŝajnas, ke lia plej grava eco estas pensemo. Li scias enprofundiĝi en ĥaoson de homaj ideoj por ordigadi ilin komprenigante la ideojn al si kaj al la aliaj. Li fariĝis funda sci-anto de Esperanto; kaj scianto pri literaturo ĝenerale, pri internaciaj problemoj kaj pri problemo nacieca; tial li verkas. Ne por esti verkisto, sed por servi al ideoj tre diversaj. En j. 1927 li publikigis Radioamatoran vortaron kvinlingvan (esperanta, ĉeĥa, germana, franca, angla). En 1929 aperis lia ĉeĥa traduko el esperanta teksto

de origine norvega verko de Odd Arnesen Vzducholodí k severní točně. En 1932 li redaktis la decembran numeron de Literatura mondo kiel ĉeĥoslovakon numeron. En 1935 li kunredaktis kun Kamarýt Ĉeĥoslovakon antologion. En 1936 li eldonigis sian ĉeĥan tradukon de Aisberg-verko »Fine mi komprenas la radion!« En la jaro 1947 li kolektas artikolojn pledantajn por la libereco de Lužica popolo. Ankaŭ lia idea laboro estas tre diverstema. Kaj ĝi signifas sukceson simile kiel lia laboro organiza.

Ĉu ni sukcesus trovi klarigon de tiuj sukcesoj tiom diversfakaj? Ĉu oni rajtas elpensi hipotezojn por tio? Amiko Ginz pardonu la sincercon: Estas honestecoj de koro kaj de intelekto, kiujn oni iam trovas ĉe lia ĝento en grado ekstreme alta. Li estas unu el tiaj honestuloj. La honesteco ŝajnas esti la plej taŭga ilo por efektiviĝi planon praktikan. Pro ĝi Ginz tiom ofte sukcesis en iniciatoj por nia movado. Pro ĝi li estu salutita respektate kaj laŭte. Ni ne timu brue laŭdi la virton, se ni ĝin renkontas!

Stan. Kamarýt.

Esperanto en ĉeĥaj komercaj akademioj kaj lernejoj. Dum la nunjara Pentekosta semajno okazis en Smokovec (Slovakujo) laborkunveno de pli ol 700 komerclernejaj profesoroj, kiun organizis la Studinstituto por Komercia Lernejararo en Praha (Studijní ústav obchodního školství). La ĝenerala kunveno de komerclernejaj filologoj, kiun prezidis d-ro Ladislav Wik, direktoro de komerca akademio en Praha-Karlín, akceptis Esperanton kiel nedevigan instrufakon instruotan ekde 1947-48 ĉe ĉiuj komercaj akademioj kaj lernejoj.

La favoran decidon minacis la cirkonstanco, ke por Esperanto ne ekzistis ĝis nun valida oficiala instruplano. Ĉar mi, kiel konstatis la prezidanto, interesiĝas pri Esperanto, la ĝenerala kunveno komisiis al mi ĝian ellaboron. Post unu semajno mi ĝin forsendis al d-ro Wik kaj ni povas do prave konjekti, ke Esperanto kiel nedeviga fako ĉe komercaj akademioj kaj lernejoj estas fakto.

Dum la debato montriĝis, ke la afero estis preparita per petskribo de nia Lerneja komisiono (vidu paĝon 6) kaj de analogiaj petskriboj el Tábor, Olomouc kaj Třebíč.

Nun mi turniĝas al vi, Esperanto-instruistoj en urboj, kie troviĝas komerca akademio aŭ lernejo: vizitu tuj la direktoron kaj proponu vin kiel Esperanto-instruiston. Al profesoroj, kiuj estas anoj de la profesorado de la koncerna lernejo, la Esperanto-horoj estos enalkulataj en la semajna hornombro. Ĉar ĉe ĉiuj komercaj akademioj kaj lernejoj estas fermataj paralelaj klasoj kaj sekve malaltiĝas la suma nombro da instruohoroj en la lernejo, vi povas per la enkonduko de Esperanto-instruohoroj eventuale savi kolegon, kiu alie ne havus la necesan nombron da instruohoroj. Tial la direktoro tre volonte akceptos vian proponon. — Ĉiuj ceteraj Esperanto-instruistoj estos salajrataj kiel eksteraj instruistoj.

Por la instruado de Esperanto necesas alme-

naŭ 14 studentoj el ĉiuj klasoj kune; se anonciĝos almenaŭ 28 studentoj, ili estos instruitaj en du kursoj kaj ĉe pli ol 56 gestudentoj en tri kursoj po du horoj semajne dum du jaroj. Laŭ la instruplano, se ĝi estos akceptita sensanĝe, estas en ĉiu kurso skribotaj du lernejoj laboroj duonjare, kies korektado validas duonan instruhoron semajne.

Volonte mi donus al mia raporto la titolon »Granda sukceso de Esperanto«, kiu estas en Esperantujo tiom ofta, sed mi konscias, ke el la decido por Esperanto povas fari grandan, veran sukceson nur vi, kolegoj Esperanto-instruistoj, funde uzante la favoran okazon, alie ŝrumpo la »granda« sukceso al sukceso surpapera... kiel tiom ofte en Esperantujo. Malfermiĝis por ni, Esperanto-instruistoj, pordeto, tra kiu ni povas konkeri iom post iom la tutan komercan lernejaron. Eĉ ne unu komerca akademio aŭ lernejo restu venontjare sen Esperanto-instruado! Jam foje antaŭ la milito la pordeto estis por ni malfermita, ni zorgu pri tio, ke neniu kuraĝu denove ĝin fermi. Malhelpo tion sole nia diligenta laboro kaj la intereso kaj sukcesoj de niaj lernantoj.

(Kilian, Třebíč.)

Morton de S. K. Neuman, eminenta ĉeĥa poeto (la 28-an de junio 1947), ni enskribas tie ĉi ne sole por rememorigi elstaran verkiston kaj batalinton por socialisma idealo, sed ankaŭ por rememorigi iaman kunlaborinton. Kiam ni, junuloj dudekjaraj, fondis en decembro 1902 Esperantistan Klubon en Praha, estis inter ni ankaŭ li, tiam poeto jam renomita, travivanta sian periodon anarĥisman. Li estis ano de unua kluba komitato akceptinte funkcion de »dom-mastro« kaj dum jaro sufiĉe regule vizitadis la semajnajn kunvenojn en kafejo Union. Li sciis la lingvon tiom, ke li povis dum polemiko kun verkisto K. Dostál Lutínov ataki lin per esperantlingvaj versoj. Tiun ĉi rememoron pri la ĝlora verkisto ni ne forgesos.

(Kamarýt.)

Poŝtkarton kun bildo de kastelo Hradčany sur unu flanko kaj sur la adresflanko kun presita esperantlingva teksto dankanta al aŭskultinto de la mallongondaj informoj, kiu konfirmis la aŭdon, estis aperigita de la ĉeĥoslovaka Radiostacio en Praha XII, Stalinstrato 12. La karto estas sendata nun al ĉiu fremda konfirminto de la aŭskultado. La aranĝo meritas laŭdon pro la ideo same kiom pro la bona kaj tre bele presita teksto.

Esperanto en fakaj gazetoj. En la lastaj monatoj ni povis legi artikolojn pri E. en kelkaj fakaj organoj gravaj kaj altnivelaj. Organo de Klubo de slovakaj turistoj kaj skiistoj Krásy Slovenska (Belajoj de Slovakujo) en Turč. Sv. Martin enhavas en ĉiu numero resumojn de la artikoloj en la lingvoj Esperanto, angla, rusa kaj franca. Krome ĝia numero el aprilo 1947 (jarkolekto XXIV, n-ro 8) enhavas slovakon artikolon de Ján Lamačka »Turisma movado en Slovakujo kaj Esperanto«. — Organo de la Societo de ĉs. filatelistoj en Brno Filatelické listy (Filatelistaj folioj) enhavas depost sia 11-a numero el 31.

V. 1947 en ĉiu sia kajero (aperas duonmonate en Brno, Ul. 9. května č. 7) rubrikon »Esperanto«, verkatan de s-o J. Vondroušek. — Organo de la Centro de ĉeĥoslovakaj filatelistaj societoj Československá filatelie (Ĉeĥoslovaka filatelo), eldonata duonmonate en Praha I, Národní tř. 9, enhavas en sia numero 10-a (el 17. V. 1947) ĉeĥan artikolon de Ota Ginz »Esperanto sur poŝtaj markoj kaj presaĵoj«, dokumentitan per multaj ilustraĵoj. Ĝi enhavas detalojn al malmultaj konatajn. Ni enpresos la artikolon en nia revuo. — Presita Jarraporto de la societo Český slepecký tisk (Ĉeĥa blindula presio) pri la jaro 1946 enhavas sur 6 lokoj aludojn pri »Ĉeĥa societo de nevidantaj esperantistoj« kaj pri ĝia organo »Aŭroro«, redaktata de samideano Vuk Ečtner. — Organo de teatro en Ostrava Divadelní list (Teatra gazeto) enhavas en sia 12-a numero de la dua jarkolekto artikolon de A. Staňura »La arto kaj internacia interkompreniĝo«, kiu konkludas, ke Esperanto jam nun estas bezona kaj uzebla por artistoj. — Organo de la Asocio de ĉeĥaj librovendistoj kaj eldonistoj Knihupec a nakladatel enhavas en sia numero el 27. VI, 1947 (26—IX) artikolon de J. Šupichová »Sesdek jaroj de la Esperanto-libro«.



Sinjinorino Anna Alamo, sveda esperantistino, kies prelego »Svedujo, mia patrujo« havas ĉie vastan resonon, estas virino ekstreme simpatia. Ni publikigas ŝian bildon en festena popola kostumo. — Pri la prelegoj ni raportas inter la Lokaj informoj. Ŝian prelegvojaĝon organizas E. Klubo en Hradec Králové.

Gardeno, unua fako de nia Asocio, aperigis presitan ĉeĥan varban flugfolion, propagandan poŝtkarton kaj unuan numeron de sia multobligita »Informilo — Ĝardeno« (ĉeĥlingva) en junio t. j. La fako jam havas preskaŭ 60 anojn. La interesatoj turnu sin al L. Kynčl, floristo en Praha VIII, Palmovka.

Regiona kunveno en Brno, la 7-an—8-an de junio 1947. Prez. Malik ĉeestis por EAĈSR, 5-membra delegacio el Olomouc kaj el Šternberk. Salutletero de EK Praha, telegramo de ges-roj Bartošík. Sabate la 7. VI. amika vespero, muziko, magiaĵoj de lertega s-ano Prudilov, bufedo kaj danco. Sed ni aŭdis ankaŭ gravajn raportojn de prez. Malik pri la Internacia transportista konferenco en Praha kaj pri la Internacia ĵurnalista kongreso, Praha. — Dimanĉe la 8-an de junio matene laborkunsido. Post prezentita raporto pri agado diskuto pri malhelpoj kaj malfacilaĵoj, speciale lokaj. Forte estis akcentita jam ĉagrena manko de ĉeĥa-esp. vortaro, sen kiu nia movado vegetos, ne prosperos kaj ne estos konsiderata serioza. Post la debato resumis s-o prez. Malik, montris al oficiala apogo de E. kaj al la fakto, ke E. estas agnoskata de altaj oficialaj lokoj, kio havas grandan valoron kaj signifon. Posttagmeze ekskurso al digo-lago ĉe Kníničky kaj ŝipveturo al kastelo Veverří. Malĝojiga estis malgranda partopreno de Brnanoj. Vizito sume 37 partoprenintoj.

Laborkonferenco en Pardubice la 21—22-an de junio kunvenigis 41 samideanojn. Ili estis el Česká Lípa, Česká Skalice, Hořice, Hradec Králové, Havlíčkův Brod, Hořice, Josefov, Karlovy Vary, Kladno, Kuks, Liberec, Libice n. D., Olomouc, Pardubice, Plzeň, Praha, Předměřice, Přebouč, Potštejn, Turnov. Sume el 20 lokoj. El Pardubice estis eĉ ne duono da ĉeestantoj. Tiu bildo estas jam kutima. Lokaj agantoj invitas en sian urbon esperantistojn el vasta ĉirkaŭaĵo kaj ne sukcesas venigi al la konferenco la lokajn en deca nombro. — La Asocian komitaton reprezentis prezidanto A. Malik. La konferencon prezidis s-o Ant. Jandík, regiona peranto de Pardubice. Sabaton vespere je 21-a horo komencis artprogramo, kiun liveris parte ne-esperantistoj s-ro Machka kaj f-ino Šimůnková. S-ro D-ro Fousek kantis kantojn de si tradukitajn, akompanate de s-o Bukovský kaj s-ino Boušková, kiu gvidis la artan parton de la programo. En nomo de ŬRO salutis la konferencon s-ro Staněk el Praha, kiu promesis al nia movado daŭran subtenon de ŬRO. Poste sekvis salutoj de la lokaj delegitoj kaj de Asocia prezidanto A. Malik.

La laborkonferencon malfermis A. Jandík. Sabaton kaj dimanĉon antaŭtagmeze traktis la konferenco pri 1. La Asocia kongreso, 2. Centra oficejo, 3. Asocia gazeto, 4. Vortaroj, 5. Ŝanĝo de la Asocia statuto, 6. Esp-o en lernejoj, 7. Eldonejo kaj vendejo Asocia, 8. Pluaj liberaj proponoj kaj iniciatoj. — Pri la diskutoj verkis s-o Jandík detalan protokolon, kiun studos la komitatanoj de la Asocio. Ĝi enhavas multajn plendojn pri mankoj ĝenerale konataj kaj malfala-

cile forigeblaj dum ni ĉiuj laboras sole amatore. Pri la gazeto nia oni plendis, ke ĝi aperas ne-regule. Ni bone tion ne komprenas, ĉar depost februaro ni aperas regule en fino de ĉiu monato. Kaj ni esperas, ke ankaŭ nia julia numero aperos en fino de tiu monato, se la presejo estos libera. Pro manko de presistoj preskaŭ neniuj monata gazeto ĉeĥa aperas tiom regule kiel la nia.

La diskutoj de la konferenco finiĝis la dimanĉon je la 13-a. Poste vizitis konferencanoj filatelistan ekspozicion, kie estas aparta stando kun oficialaj poŝtaĵoj kun esperanto-tekstoj. Aranĝis ĝin kluba sekretario Fr. Nálevka. Post vizito de la ekspozicio multaj konferencanoj vizitis Kunětická Hora.

Aludo pri Esperanto en ĉeĥa lernolibro lern-eja. Jus aperis »Lernolibro de geografio por pli

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Programo de la kunvenoj: 7. I. 60 jaroj de Esperanto (Jos. Vondroušek). 14. I. Skribu eksterlanden, ke... (Jan Geryk). 21. I. Sinonimoj en Esperanto (Alois Potuček). 28. I. Ĉapitroj el kristana teozofio (Ing. V. Kroužil). 4. II. Tasko de la gramofondisko (Jiří Kořínek). 11. II. Pri internacia korespondado (Rud. Nečas). 18. II. Generala kunveno. 25. II. Mozaiko el E-gazetaro (M. Adamcová). 4. III. Vespero por festi naskiĝtagan datrevenon de la Prezidento-Liberiginto T. G. Masaryk. 11. III. Eminentaĵoj samideanoj vizite en Brno (M. Vondroušková). 18. III. Poezia vespero. 25. III. Mi rakontas fabelon al vi (J. Dominik). 1. IV. Gaja aprila vespero. 8. IV. Londono en miaj rememoroj (Nelly Zitová). 15. IV. 50 jaroj de kinematografio (Tom. Borkovec). 22. IV. La vivo kaj universo (Jos. Vondroušek). 29. IV. Koncerta vespero. — Krom la programo estas praktikataj en la kunvenoj: semajna kroniko pri la movado, vivanta gazeto, aktualaĵoj, societaj ludoj, E-gramatiko, legado de la korespondaĵo, ktp. — **Prelegoj de A. Alamo.** La 19-an de junio antaŭtagmeze estis aranĝita prelego por studentaro de du komercaj akademioj en Brno en kino Metro, kiun vizitis pli ol 700 lernantoj kun profesoroj. Sukceso grandega, impresoj profunda kaj la plej bona. La paroladon interpretis s-ro Vitek, kiu ankaŭ havis tre interesan paroladon kaj multe helpis al la sukceso. — Vespere la saman tagon okazis la dua prelego en plenege aŭditorio de filozofia fakultato de Masaryk-universitato, ĉeestis pli ol 350 homoj. Vortoj de ĉarma kaj simpatia samideano estis ofte interrompataj de aplaŭdo kaj kreis amikan, intiman etoson. Plue raportis s-ro Vitek pri sia vojaĝo en Svedio kaj sprite, amuze akompanis kaj komentis belajn lum-bildojn. Ĉeestantojn bonvenigis kaj la prelegon interpretis J. Vondroušek. Ni aŭdis pri Svedio helpema kaj helpanta la viktimojn de la dua mondmilito, pri amplena agado de la tuta nacio, kiu savis centmilojn da infanoj, eĉ naciojn antaŭ morto kaj pereoj, pri Svedio tute neneŭtrala rilate al malbono. — Tagon antaŭ la prelegoj estis s-ro Alamo kondukita al infana soleno de popola lernejo. Alparolo, kiun faris nia gasto, estis kortuŝa kaj donis al la kunveno pli solenan karakteron. Partoprenis ĉ. 300 infanoj, instruistoj kaj gepatroj. — La radio-intervjuo, kiun ni aranĝis, estis disaŭdigita la saman vesperon antaŭ la prelego. — Ni mem estas tre kontentaj, ke ni povis montri al niaj ŝatataj gastoj la urbon, Macoĥa'n kaj la grotojn, kaj same pro du tre amikaj kunvenoj. — Ni tutkore dankas karan s-inon Alamo pro la belaj tagoj amikaj kaj serenaj, pro grava helpo al nia laboro. Same nia danko apartenas al s-ro Vitek. Pro la granda sukceso ni dankas al ĉiuj niaj klubanoj, ame kaj entuziasme laborintaj. (J. Vondroušek.)

Chlumec n. C. — La 29-an de majo finiĝis dua kurso kun tre bona sukceso. Entute partoprenis en du kursoj ĝis lasta horo 38 personoj, el ili dudek ĝeinstruistoj. Kelkaj el ili eĉ eminente lernis la lingvon. Laŭdon meritas s-ro lernejdirektoro Ryba, helpe de kiu ni povis sukcese

altaj klasoj de mezlernejoj» (Uĉebnice zeměpisu pro vyšší třídy středních škol) de Klement Urban kaj Frant. Zpěvák. La unua el la aŭtoroj estas multjara esperantisto, kiu dum siaj vojaĝoj faris ankaŭ ne unu paroladon esperantlingvan pri Ĉeĥoslovaka respubliko. En tiu ĉi libro estas sur paĝo 177 ĉe urbo Bialystok informo: »Tie ĉi naskiĝis Dr Zamenhof, kreinto de Esperanto, ĝis nun praktike la plej sukcesa internacia lingvo, kiu taŭgas precipe por internacia korespondado inter studentoj.« Ni estus uzintaj alian tekston. Uzo de Esperanto por studenta korespondado ne estas ĝia plej ĉefa uzo, kaj Esperanto estas la sola internacia lingvo, kiu estas praktike uzata. La ceteraj estas projektoj, ĉiuj derivitaj de Esperanto, kaj uzataj sole por studaj celoj de interlingvistiko. Se oni volas esti tro neŭtrala, oni ne ĉiam sukcesas raportii laŭ faktoj.

aranĝi la kursojn en tiu silenta urbo. La 7-an de junio estis aranĝita kursfina festo, kiun ĉeestis gesamideanoj el Hradec Králové kaj Skřivany. Oni preparas fondon de Esperantista klubo, loka grupo de la Asocio.

Ĉeská Lípa. — Ni legis en Bulteno de la XI-a Sokol-kongreso 1948, ke dum la regiona Sokol-kongreso en Ĉeská Lípa estos aranĝita de la tiea Sokol-grupo ekspozicio de Sokol-memoraroj, ĉeĥa libro kaj Esperanto-filatelio. La ekspozicio estis la 8—15-an de junio en la urba biblioteko kaj havis tre bonan viziton. — E. K. aranĝis la 7-an de junio kune kun la Distrikta kleriga konsilantaro en la urba teatro ĉeflingvan prelegon de s-o faka instruisto Josef Vitek: Svedio per miaj okuloj. Je la 15-a horo estis la prelego por infanoj, je la 20-a horo por plenkreskuloj. Ambaŭ prelegoj estis bone vizititaj kaj tre kontentigis ĉiujn aŭskultantojn.

Darkov. — Laŭ instigo de Esperantista klubo „Komenský“ estis fondita en tiu ĉi banloko kun jodhavaj fontoj Esperantista klubo „D-ro Esperanto“. Prez. Rob. Lipka, vicprez. Léon Lipka, sekret. Kar. Kosiec, kas. Rud. Zie-lonka, administr. Rud. Tománek, reviz. Ludvik Grim kaj Jos. Kolarz. Muzika sekcio: f-ino Hilda Grimová (piano) kaj J. Raszik (violono). Al la klubo aliĝis 23 membroj. Konstituan kunvenon ĉeestis ankaŭ esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo, kiuj partoprenis ankaŭ aktive en la artista programo. Post parolado de Kubala prezentis muzikajn pecojn kaj naciajn kantojn Grimová, Raszik, Weisová, Targosz, Hrbáčková, Rob. Lipka, Vajdik kaj la esperantistoj de Zábřeh. Regis plej amika atmosfero. La kunveno estis finita per kanto de ŝtata himno kaj poste la partoprenantoj vizitis grupe la banlokan parkon.

Falknov. — La 24. VI. okazis konstitua kunveno de prepara komitato por fondo de loka grupo de EAČSR. Ĉeestis Zvěřina el K. Vary, kiu gvidis en Falknov kurson por komencantoj. Elektitaj estis: prez. Miroslav Machulka, komerca komizo, Falknov, Ulice ĉs. branné moci 1 (al kiu direktu provizore ĉiun korespondaĵon), vicprez. Jaroslav Frinta, poŝtoficisto, sekret. Jiří Teřl, stud., kas. Luděk Čech, kom. komizo, komitatanoj Zdena Machulková, Arnošt Gruber. Loka peranto Josef Svoboda, Dolní Rychnov u Falknova, direkcio FHD.

Hradec Králové. — Kiam ni eksciis precizan daton pri alveno de sveda samideano Alamo al nia urbo, ni aranĝis, ke ŝi estu akceptata jam en limstacio kun bukedo de rozoj. Alvenon de ekspresvagonaro en Hradec Králové atendis 35 gesamideanoj. Bedaŭrinde, homo pensas kaj alia homo ŝanĝas. Sinjorino Alamo ne atingis en Varsovio vagonaron al Hradec Králové, sed devis veturi per alia vagonaro rekte al Praha. Sed tio ne estis por ni grava malhelpo. Ni tuj telefonis al Wilson-stacio en Praha, ke sinjorino Alamo estu vokata per laŭparolilo esperantlingve al telefono, kaj tial povis aŭskulti multaj homoj en haloj de stacidomo nian lingvon. Sinjorino Alamo revenis

al Hradec Králové nur per vespera rapidvagonaro kaj tamen akceptis ŝin dudeko da gesamideanoj. En Hradec Králové okazis tri publikaj paroladoj. — La unuan de junio okazis ekskurso al Avineta Valo (Babičino údolí), partoprenis gesamideanoj el Hradec Králové, Pardubice, Trutnov, Josefov kaj Česká Skalice. Varmega tago pelis ĉiujn partoprenantojn en allogan riverakvon por sin iomete refreŝigi. Samideano Dr. Enlidraketo preparis en la naturo, ĉe la rivero, amuzan marionetludon. La ĉeestantoj ankaŭ trarigardis muzeon en Ĉ. Skalice, kie al ni afable ĉion klarigis s-ro Jan Krtička, direktoro de la muzeo.

Josefov. — La 17-an de junio fondiĝis nova esperantista klubo.

Karlovy Vary. — La 26.—27-an de junio estis por la loka grupo de EAĈSR veraj festotagoj, ĉar dum tiuj tagoj ni havis la honoron gastigi svedan s-inon Anna Alamo kaj nian samlandanon s-anon J. Vitek, tiun ĉi sukcesplene kaj senlace laboreman E-paron. La 26-an de junio vespere okazis en restoracio „Jizera“ kluba kunveno kun ĉeesto de ambaŭ niaj ŝatataj gastoj, kiuj parolis al la klubanoj, sopirantaj aŭskulti multe en Esperanto kaj pri ĝi. S-ano Vitek parolis pri la interna ideo de Esperanto. Eksterordinare streĉite ĉiuj aŭskultis la vortojn de s-ino Alamo, kiu parolas tiom modele nian karan, belsonan Esperanton. La atmosfero estiĝis tiom intima kaj amika, ke sentema s-ino Alamo menciis la sorton de sia edzo, kiu dum la lasta milito, gardante la limojn de sia patrujo kontraŭ ebla malamiko, tiom malsaniĝis, ke li, revenante el la milda nordo, spite flegado de sia zorgema edzino, mortis. Per starigo ni honorigis la rememoron de la edzo de nia gastino. — Vendrede la 27-an de junio antaŭtagmeze niaj karaj gastoj, akompanataj de grupeto da samideanoj, sub faka gvido de inĝeniero el la banejdirekcio, trarigardis internajn aranĝojn de la mondofamaj banejoj kaj la sangiajn fontojn. Posttagmeze ĝuis niaj gastoj la ravan naturecon de la plej proksima arbarriĉa ĉirkaŭaĵo de Karlovy Vary. — Vespere okazis en Banejdomo III la bonega kaj interesa parolado de s-anino A. Alamo, kiun interprenis s-ano F. Milek. La aŭskultintoj - kvankam ne multnombraj - preskaŭ glutegis elkorajn vortojn de la sveda samideano kaj kun same granda intereso sekvis poste la lertajn akompanajn vortojn de s-ano J. Vitek al belaj lumbildoj de svedaj regionoj, kiujn li pasintjare travojaĝis. La membroj de nia juna E-klubo estis feliĉaj, ke ili tiom bone komprenis la paroladon de nia unua eksterlanda gasto kaj ĉiuj enamas Esperanton pli multe. Ni nur bedaŭras, ke la vizito de ĉi tiuj du bonegaj E-propagandistoj okazis en la tempo, kiam la studentaro kaj lernantaro de Karlovy Vary estis forveturintaj por partopreni la lernejajn gimnastajn festojn en Praha. — La konata loka fotoreportanto Fo-Fi-Fo fotografis s-inon A. Alamo, petis ŝian subskribon kun esperantaj vortoj pri Karlovy Vary kaj lokigis ŝian pligrandigitan portreton en elmontran fenestron sur la ĉefstrato, inter eminentulojn, vizitantajn faman banlokon, kaj tie troviĝas la sveda esperantistino inter portretoj de nia ŝtata prezidento dr. Edv. Beneš, de lia frato Vojšta Beneš, de marŝalo Koněv kaj de glora ĉefa komponisto J. B. Foerster. Tiel samideano Alamo faras poresperantan propagandon en Karlovy Vary ĝis hodiaŭ.

Liberec. — Kursfina festo estis la 17-an de majo en klubejo en YMCA.

Olomouc. — La popola estraro de la urbo Olomouc montris jam multfoje komprenon por nia movado. Tial la Esperantista societo en Olomouc estis inter la unuaj korporacioj, kiuj obeis la alvokon de la urbo kaj decidis elsendadi libervolan laborgrupon el siaj membroj al la konstruo de tramvojo en la antaŭurbon Hodolany. Jam la 31-an de majo venis la unua laborgrupo el olomoucaj samideanoj kun esperantista standardo kaj kantante esperantistajn kantojn al la laborloko. La grupo estis 19membra, inter ili ankaŭ la plej juna samideano el Olomouc, 8jara Jiří Šrámek. Esperantistoj el Olomouc konstatis, ke dediĉante sian sabatan posttagmezon al la laboro por la urbo, ili vekis grandan intereson inter la publiko kaj ili opinias trovi novan propagandmanieron por Esperanto, la penon indan por la konstruo de nia ŝtato.

Plzeň. — Klubo de okcidentbohemiaj esperantistoj kaj Societo de laboristaj esperantistoj Kulturo aranĝis la 12-an de julio en Měšťanská beseda feston por rememorigi

la 60-jaran ekziston de Esperanto kun sekva programo: Saluto de ĉeestantoj (Gross), Esperantista himno, Sesdek jaroj de Esperanto (Kavan), Dro Schulhof: J. A. Komenický (Havejková), Karboministo (Patera), Haĝi Dimitro (Pelcman), Dro Schulhof: Al via lingvo (Krause). En programo alternis muziko post ĉiu numero. — En semajno 6.—13-a de julio estis en montrofenestroj de Lad. Svoboda (Pražská str.), Jos. Hylák (Stalinstr.) kaj J. Šimák (Stalinstr.) ekspozicioj de esperantaj libroj, gazetoj kaj aliaj esperantaj.

Praha. — Esperantista klubo en Praha, fondita 1902, festos tiun ĉi jaron sian 45-jaran jubileon. La regula ĝenerala kunveno de la Klubo, kiu okazis la 20-an de aprilo 1947, donis supervidon pri la agado dum la pasintaj 15 monatoj. Publika agado de EK Praha celis ĉefe la propagandon de la movado kaj disvastigon de la lingvo. Regulaj kunvenoj, kiuj okazis ĉiumerkrede dum tuta jaro, estis verdire ĉefa centro de esperantista movado en ĈSR. Kunvenadis ne nur la komitatanoj kaj multaj membroj de la Klubo, sed ankaŭ la funkciuloj de la Asocio el Praha kaj el provincoj, plue multaj gastoj el la tuta respubliko kaj el eksterlando. La programo de la kunvenoj estis abunda; regula enhavo de la programoj konsistis el a) semajnaj raportoj el esperantista mondo de s-ano prez. J. Šustr, b) novaĵoj el esperanta disaŭdigo de radiostacio Praha, kiujn donis alterne s-anoj Malik, Slanina, Mařík kaj Hromada, c) pruntado de libroj el klubaj biblioteko, legado de gazetoj kaj konversacioj en amikaj randoj, d) preleĝoj je diversaj temoj kaj amuzaj programoj. Krom tio estis pritraktataj organizaj aferoj de la Klubo kaj same de la Asocio. Tiamaniere fariĝis el klubaj kunvenoj kelkfoje dum la vespero kunvenoj asociaj. Antaŭ la kunvenoj de la 19—20-a horo aranĝis s-ano J. Valeš regule konversacian rondon por finintoj de kursoj. — Menciindaj preleĝoj kaj programoj: 3. 7.: T. Balda: Ideo de nia Majstro kaj altaj celoj de Esperanto. 10. 7.: Arne Glud, Kopenhagen: Miaj impresoj el ĈSR kaj vojaĝo tra Germanio. Hans Unger, Zurich: Salutparolo kaj rememoroj je XIII-a kongreso. Sendita salutletero al prezidento de respubliko Dr. Edv. Beneš. 17. 7.: A. Malik: Raporto pri traktado de reprezentantoj de EAĈSR kun reprezentantoj de SES la 13.—15. 7. 1946 en Brno. 31. 7.: A. Slanina: Raporto pri Someraj kursoj de Esperanto en Doksy. Grupo de partoprenintoj prezentis kantojn kun akompano de mandolino. Dr. A. Pitlík prelegis propran poemon pri Doksy. 14. 8.: S-ano Antonov: Salutparolo kaj novaĵoj el Bulgario. K. Šolc: Interesaj el Someraj kursoj en Doksy. 21. 8.: Dir. de Jong: Salutparolo en nomo de nederlandaj samideanoj. A. Slanina: Filmvespero — mallongaj filmoj esp. k. amerikaj groteskoj. 4. 9.: F. Čermák: Fakpreleĝo pri stereotipio. 11. 9.: A. Malik: Preleĝo pri T. G. Masaryk. 18. 9.: S-ino Daenis el Brusel kaj s-ano Grisel el Francio: Salutparoloj. 2. 10.: A. Slanina: Publika prezentado kaj parolado de esperantistoj. 16. 10.: Memorespero je la XIII-a univ. kongreso de E. en Praha 1921: Rakontis partoprenintoj: Dr. A. Pitlík, s-ino Cimrová, R. Hromada kaj J. Šustr. 23. 10.: Vl. Boháčová: Prezento de litovaj poemoj en Esperanto. 30. 10.: F. Sviták: Solenparolado pri la 28. oktobro. 13. 11.: R. Schwartz: Francio nuntempe kaj impresoj el ĈSR. S-ano Hebký: Kion skribas eksterlandaj korespondantoj. M. Nývlt: Deklamo de propraj esp. tradukoj el poemoj de Neruda. 20. 11.: Debatvespero je la temo Ĉeĥa preso kaj Esperanto. Diskuton partoprenis s-anoj: Šustr, Dr. Pitlík, Malik, prof. Novljan k. a. 27. 11.: A. Janoušek: Informoj pri la kongreso 1947 en Bern. Dr. Pitlík: Pri la kongresoj en Bern, kie ĝi okazos jam la kvaran fojon. 11. 12.: S. Demelun (Francio): Rakontis pri ŝia vojaĝo al ĈSR kaj pri la impresoj en Praha. 13. 12.: Nikolaa vespero kaj solena transdono de klubaj flagoj de s. Prokop. Riĉa programo, nikolaa sceno, kantoj, komikaj scenoj, orkestro kaj danco en tuta kafejo Louvre. 8. 1. 1947: Laborbrigado por EAĈSR - laboro pri la membrakartaĵo. 15. 1.: T. Balda: La vivo kaj la verkoj de J. A. Komenický, kun lumbildoj. 29. 1.: K. Čičanov, Sofia: Esperanto-movado en nova Bulgario. J. Mařík: Raporto pri artikolo el svisaj gazetoj: J. V. Stalin lernis Esperanton dum sia malliberigo en Siberio kaj estis tiam konvinkita, ke Esperanto povos fariĝi komuna oficiala lingvo de estonta mondŝtato. 12. 2.: J. Čížek: Raporto pri la ekrilato kun eksterlandaj tramistoj. 19. 2.: T. Balda: Legendoj pri Krakonoš, kun lumbildoj. 5. 3.: Dr. Pitlík: „Lingva ko-

mitato" kaj esperanta akademio. F. Čermák: Raporto pri la oficiala akcepto de Esperanto ĉe hungara socialdemokrata partio kiel internacia lingvo kaj pri simila propono al SDP ĉe ni. 12. 3.: J. Šustr: Raporto pri la kunfandiĝo de IEL kaj UEA; pri la signifo kaj kolektado de petskriboj por UNO. Dr. Pitlík: Novaĵoj el Doksy por la somero 1947. 19. 3.: V. Echtner: Deklamado de poemo pri J. A. Komenský de Dr. Schulhof. S-ano Heikenwälder: Raporto pri la plano je fondo de esper. eldonejo en Prostějov. 26. 3.: A. Malik: Gravaj organizaj demandoj de nia movado en ĈSR. 29. 3.: Amika vespero antaŭ kongreso de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Varia programo: Kantoj - trio de s-ino Baldová, f-inoj Voborská kaj Šimandlová: popolkantoj ĉefe kaj esperante; f-ino Zvědělíková: solo-kantoj; amuzaj recitadoj kaj fabeloj: ges-anoj Balda kaj Kyněl, Čičanov, Tarantiková, Heikenwälder, Dr. Vaněk. Konferencis A. Slanina. 9. 4.: T. Balda: Vojo en Egiptujon, kun lumbildo. 16. 4.: Memroverspero je 30-jara datreveno de morto de Majstro Dr. Zamenhof. Parolis s-anoj T. Balda, Dr. Pitlík, J. Šustr. Entute okazis de pasinta ĝenerala kunveno 63 membro-kunvenoj, kiujn vizitis alterne 2707 membroj, 311 gastoj; el tio estis 53 eksterlandanoj - anoj de 12 nacioj. Meznombrata vizito estis 45 personoj. — Ekster la kadro de klubaj kunvenoj aranĝis la Klubo jenajn entreprenojn: 23. 8. 1946: Filmvespero en la Klubo de kinoamatoroj, Praha II, Trojická. S-ano dir. de Jong prezentis 3 mallongajn filmojn pri Nederlando antaŭ la plenokupita ĉambrego. Lian vortakompanion el Esperanto tradukis en ĉeĥan lingvon s-ano Slanina. 15. 9. 1946: Kluban ekskurson per vaporŝipo al Mělník aranĝis s-anoj Čermák kaj Khel. Tiun ĉi belan, amuzan entreprenon partoprenis 15 gesamideanoj. — Komunaj ekskursoj de EK Praha en regionajn lokojn okaze de amuzentreprenoj kaj regionaj laborokonferencoj okazis entute 8; ni mencias tiujn, kiuj okazis ek de dua duonjaro 1946: 27. 7. Doksy, 20 partoprenintoj; 21. 9. Liberec, 3 p.; 25. 1. 1947 Mladá Boleslav, 6 p.; 19. 3. Hradec Král., 14 p. Tiel la EK Praha subtenis la entreprenojn kaj la movadon en aliaj regionoj. Samtempe havas la komunaj ekskursoj gravan propagandan valoron, ĉar ĉie survoje la publiko vidas, ke nia movado vivas kaj Esperanto estas parolata, speciale se partoprenas iu eksterlandano. — Kursoj de Esperanto, kiuj apartenas al ĉefaj taskoj de la Klubo, estis pluen aranĝataj en Laborlernejo de ŬRO. Okazis ŝerinterrompe kursoj komencaj kaj progresaj kun multnombraj partoprenintoj. La Klubo kunlaboris kun la direkto, partoprenis en la varbado en siaj kunvenoj kaj per flugfolioj dissenditaj al ĉiuj membroj ktp. La kursojn gvidis niaj s-anoj Slanina kaj Král. Ankaŭ en Someraj kursoj en Doksy prelegis niaj anoj Slanina kaj Dro Pitlík. — Disaŭdiĝo: En esperanta elsendado de radiostacio Praha kunlaboris daŭre membroj de EK Praha s-anoj Malik, Hromada, Mařík, Slanina kaj multaj aliaj. — Preso: Ĉiutagaj gazetoj en Praha montris bedaŭrinde malgraŭ ĉiuj klopodoj ĝis nun relative malgrandan komprenon por nia afero. Aperis nur neregule artikoloj aŭ sciigoj el la movado, liveritaj rekte de la Klubo aŭ de unuopaj membroj. Plej ofte ni havis sukceson en „Lidová demokracie" kaj en „Práce". Tie ĉi havas la Klubo en ĉefurbo grandajn malavantaĝojn kompare al samideanoj en aliaj regionaj centroj, ĉar la redakcioj havas ĉiutage amason da gravaj kaj tute freŝaj informoj kaj okazintaĵoj. Sed estas nepre necese atingi la regulan aperadon de raportoj pri la agado de niaj organizoj kaj artikoloj pri novaĵoj el nia movado. — Esperantaj gazetojn abonis la Klubo aŭ abonpage aŭ interŝanĝe la jenajn: Esperanto Internacia; Esperanto, Genève; Esperantista; Esperantisto Slovaka; Internacia Kulturo; Literatura Mondo; Heroldo; Svisa Espero; Svislando vokas; Espero Katolika kaj Vojo - Vero - Vivo (nederlandaj); Esperantobladet (norvega); Paco kaj Justeco (belga); Svenska Esperanto Tidningen kaj Arbetar Esperantisten (svedaj); SAT-Amikaro (Francio); Libera Tribuno (Sud-Afriko); La Rondo (Aŭstralio). Tiun ĉi servon organizis tre sukcese la revuisto s-ano T. Balda. — Daŭra propagando ekstera. La Klubo instalas 3 novajn reklamtabulojn ĉe domeniĝo kaj en ŝtuparejo de Louvre kaj partoprenas je la reklamo ĉe Wilson-stacidomo. Unuopaj membroj instalas diversloke propagandkestojn, afiŝtabulojn, eldonis diversajn afiŝojn kaj flugfoliojn, (ekz. s-anoj Koutek, Balda, Lorenc, Slanina, Šustr k. m. a.). EK-Praha posedas nun ankaŭ belan kluban flagon, donacon de s-ano Prokop. Tio

bedaŭrinde ne sufiĉas por la ĉefurbo de respubliko. Estas necese organizi ĉi tiun servon laŭplane, sed mankas kunlaborantoj kaj materialo. — Gravan sukceson por nia afero atingis en socialdemokrata partio klubaj bibliotekisto s-ano F. Čermák. Je lia instigo estis ĉe centro de „Laborista Akademio" fondita esperanta sekcio. La bulteno de L. A. aperigis propagandan artikolon pri Esperanto. La presa servo de SDP represis artikolon pri Esp. En la gazeto de centra asocio de DTJ estos denove post 20 jaroj malfermita esperanta angulo, kiun redaktos s-ano Čermák. — Interna laboro de EK-Praha koncentriĝis plejparte je la organiza konstruo kaj reboniĝo de perdoj, kaŭzitaj de la okupacio. Al ĉefaj taskoj apartenis: a) Establo de membrokadro kaj ĝia ekipo per legitimacioj kaj necesaj informoj. b) Pretigo de novaj membroregistraj kaj adresaroj. c) Reordigo de la biblioteko, kolektado de reklam- kaj propagandmaterialo, aĉeto de nova adresmaŝino. d) Reguligo de financaj kaj kotizaj aferoj de la Klubo kaj kun la Asocio. e) Organizo de klubaj programoj. — Kluba administrado: Membraro: Dum pasinta periodo aliĝis 266 novaj membroj, eksiĝis, transloĝis aŭ mortis 64, nombro de registritaj membroj la 20. 4. 1947: 562. Por la jaro 1946 pagis 454 membroj, ekde revolucio 1945 estis registritaj entute 626 membroj. Ĉiuj membroj ricevis membrokartojn kaj kotizmarkojn. Proksimume tri kvaronoj da membroj estas el Praha, la resto rekrutas sin el proksimaj kaj malproksimaj lokoj en tuta respubliko, kie ankoraŭ ne estas lokaj kluboj. Ĉiuj membroj de EK-Praha fariĝas aŭtomate ankaŭ regulaj membroj de EAĈSR. Jen faktoj, kiuj parolas pri la senekzempla progreso kaj organiza laboro en la movado! — Korespondado: Leteroj forsenditaj 511, ricevitaj 484, krom la presajoj; presajoj (cirkuleroj) estis eldonitaj 14 kaj dissenditaj en tutnombro 6230. La korespondadon gvidis plejparte klubaj sekretarioj. — Financoj 1946: Enspezoj Kčs 48.000.—; elspezoj: por propagando kaj administrado Kčs 21.000.—, kotizoj al la Asocio Kčs 18.000.—. La monmastrumadon gvidis tre ofere kaj precize klubaj kasistino s-ino A. Bárochová. — Funkciuloj de EK-Praha elektitaj por la jaro 1947: prezidanto J. Šustr, vicprez. A. Slanina, sekretario F. Sviták, kasist. A. Bárochová, bibliotekisto F. Čermák, revuisto T. Balda, arĥivistino Ŝ. Jelínková, protokolistino V. Boháčová; vickomitatanoj: J. Němec, V. Lorenc, F. Páv, F. Landsman, A. Fryšová, ing. B. Molnár; revizoroj: B. Řeháčková, R. Brádlér; vicrev.: J. Janda. — La cirkonstanco, ke la Asocio ne havas propran oficejon kaj ĝiaj plejmultaj funkciuloj rekrutas sin el nia membraro, rimarkinde lamas la propran laboron de la Klubo. Sed malgraŭ tio la notitaj faktoj montras koncizan bildon pri la ampleksa agado de EK-Praha, kiu certe havas gravan meriton pri la progreso de nia movado en ĈSR.

(F. Sviták.)

Tábor. — Reklama klubo (Re-klubo) en Tábor kun Esperanto-klubo aranĝis la 25-an de aprilo prelegon de s-ano J. Vítek pri Svedlando. Vendrede vespere okazis la publika prelego en kafejo „Grand" kaj ĉeestis ĝin proksimume 200 personoj. Sabate antaŭtagmeze okazis 2 prelegoj por lernejoj en kino „Lucerna". Partoprenis 1200 studentoj el ambaŭ gimnazioj, komercaj akademioj kaj lernejoj kaj el fakaj lernejoj. La prelegoj tre plaĉis al publiko kaj same al studentoj kaj profesoroj. S-ano Vítek ricevis specialan dankon de direktoro Dr. Zeman el gimnazio. Pri la prelego estis aperigita artikolo en gazeto „Nový Směr". — Klubo aranĝis novan ekspozicion en fenestroj de „Hospodářská záložna". Estas montrataj esp. gazetoj, korespondado kaj filatelo. La ekspozicio estas plenigita per tabuletoj kun esprimoj de eminentaj homoj pri Esperanto. — Sabate la 10-an de majo vizitis klubon episkopo de ĉeĥoslovaka eklezio s-ro dro M. Novák kaj havis esperantan prelegon al klubanoj. La prelego tre entuziasmigis ĉeestantojn. Estis donita por rememoro de tiu vizito al s-ro episkopo speciala letero. Ĉeestis 45 samideanoj. — Loka lernejo de laboro aranĝis ek majo novan kurson de Esp., kiun vizitas 17 personoj komencantoj. Kurson gvidas Ing. Krajč. — En Svaz české mládeže estis kurso de Esp., kiun gvidis studento V. Zeman. Partoprenis 20 personoj. — En gimnazio prelegis pri Esp. lernanto de 8-a klaso J. Zumr kaj vekis novan intereson. En la klaso estas jam 11 novaj adeptoj. En gimnazio en Tábor, Riegrovo n., instruis posttagmeze studentojn Esperanton studentoj V. Zeman, J. Zumr kaj K. Kubka. —

En la stacidomo estas jam la tabulo kun surskribo: „Per Esperanto tra la tuta mondo“ kaj kun adresoj kaj telefon-numeroj de delegitoj. Sur la ĉefa strato estas malgranda ŝranketo de klubo, kiu vekas intereson per enhavo de korespondaĵoj, precipe ĉe filatelistoj. — En lasta tempo denove publikigas gazetaro en Tábor artikolojn pri Esperanto. —ilk—

Třebíč. — Anna Alamo estas atombombo. Sed ĝia fortego ne estas detrua kaj frakasa, pereiga kaj neniiga, sed viviganta kaj konstruanta, fekunda kaj fruktodona. Ĉarmo, modesto kaj eksplodema temperamento, jen la tri sorĉaj vergoj, per kiuj ŝi kaptas ĉies intereson kaj malfermas ĉies koron. Ĉarmo kaj temperamento estas donacoj de l'ĉielo; al Anjo la ĉielo donacis ilin per plenaj manoj. Kaj ŝia modesteco povus esti modelo eĉ al la plej famaj mondvojaĝantaj Esperanto-propagandistoj. — En Třebíč ŝi parolis kvarfoje: unufoje la 20-an de junio en Třebíč-Borovina dum la tagmeza paŭzo al 350 laboristoj de Bafa-fabriko, trifoje la 21-an: antaŭtagmeze al 600 ĝeknaboj de kvar burĝaj lernejoj kaj tuj poste al 600 gestudentoj de komerca akademio kaj gimnazio; vespere al 150 loĝantoj de Třebíč. Entute do aŭskultis ŝin 1700 personoj. Plej grandajn zorgojn faris al ni la vespera parolado, ĉar estis varmega tago kaj samtempe okazis en la urba parko karnavalo. Spite la danĝeran konkurencon la salono estis plena dank' al 5 artikoloj en diversaj gazetoj, multnombraj afiŝoj kaj al riĉkolora raporto fare de l'antaŭtagmeza aŭskultantaro al siaj gepatroj. La loka Reklama Klubo - Reklub inde ornamis la salonon per floroj kaj laŭoarbetoj; busto de prezidento E. Beneš kaj flagoj ĉefoslovaka kaj sveda donis al la vespero solenan karakteron; plej supre vidiĝis nia simbolo: pentrita terĝlobo kun malfermita fenestro, en kiu brilis verda stelo, Esperanto — fenestro en la mondon. La vesperon malfermis per klarigaj vortoj profesoro Havlena, estro de la Distrikta Kleriga Konsilantaro, kiu aranĝis la paroladojn. Tre agrable surprizis nian gaston kaj la aŭskultantaron la urbestro s-ano Ant. Brabec, kiu bonvenigis s-aninon Alamo en Esperanta paroladeto kaj transdonis al ŝi en la nomo de la Loka Nacia Komitato disketon, surhavantan la blazonon de Třebíč kaj dorsflanke jenan esperantan tekston: „Al s-ino Anna Alamo kiel remomoraĵon dediĉas la LNK en Třebíč. 21. VI. 1947.“ S-ano Zd. Vrba donacis al nia gasto belan

mempentritan akvarelon de la urbo. Anjo ekparolis... ne, ŝi ekaktoris. Kiam sur la tolo montriĝis la sveda reĝa familio kun la simpatia „Mister G.“ la aŭskultantaro kore salutis lin per longa aplaŭdo. La aplaŭdo ripetigis, kiam s-anino Alamo parolis pri Göteborg, la urbo de Smetana, kie vivis kaj laboris nia plej granda muzikverkisto. Tio ne plu estis simpla parolado kun lumbildoj. La parolado ŝanĝiĝis en manifestacion de sincera simpatio kaj kora amikeco al la sveda popolo. La ĝeneralan impreson pri la vespero esprimis nekonata aŭskultinto, kies juĝon mi hazarde aŭskultis: jen ĝi estis amuza, jen kleriga, jen solena, jen kortuŝa; parolado, kia ĝi devas esti. (Kilian.)

Valaŝké Meziříčí. — La 10. 6. vizitis la urbon sveda samideanino A. Alamo, akompanata de s-ano J. Vitek el Hradec Králové. En la stacidomo ilin bonvenigis lerneja inspektoro Ressel por loka kleriga konsilantaro kaj lokaj samideanoj. Estis aranĝita vizito al ŝtata gobelena fabriko en Val. Meziříčí, la sola tiuspeca en la respubliko, sekvis aŭtomobila ekskurso al banurbo Rožnov n. B., kie la sveda gastino konatiĝis kun la kolektoj de valaŝia muzeo. Vespere je la 20-a horo okazis en prelegĉambro de la gimnazio ŝia parolado pri Svedujo, akceptita kun entuziasmo. Ŝi parolis ankaŭ pri la postmilita vizito de 300 ĉefaj infanoj al Svedio kaj estis kortuŝe, kiam post la parolado ŝin alpaŝis kelkaj knabinoj, salutis ŝin per svedaj vortoj kaj transdonis al ŝi bukedon. Ili estis inter la menciitaj infanoj, vivintaj en Svedio. La unua sekvo de ŝia parolado estas Esperanto-kurso, aranĝota post somera libertempo de la Loka kultura komitato. Krome estiĝis ĝenerala serioza intereso por nia lingvo. Parolado de nia sveda amikino faris bonegan impreson kaj efikis plej kontentige.

Kursina festo, aranĝita de E. Klubo en Brno estis la 5-an de marto en granda halo de la Labor-lernejo ŬRO en str. Janská 22. Post la himno salutis la ĉeestantojn en nomo de la Laborlernejo sekretario R. Ulrich, en nomo de la E. Klubo prez. J. Vondroušek, en nomo de kursanoj rev. J. Ambrož. Poste esperantlingve kantis Zorka Mázlová, membrino de Radio-stacio en Brno Slovakán kanton de Kovařovic (tr. de Jan Geryk), ariojn el Vendita fianĉino kaj el Najado (tradukitajn de T. Pumpr). Finis la programon parolado de prof. Th. Kilian, aŭtoro de la lernolibro, laŭ kiu la kurso estis gvidita de Jan Geryk.

Je memoro al la „Somera Esperanto-Lernejo“ en Doksy

(19. VII.—2. VIII. 1947)

SUR LA LAGO DE MÁCHA

(Dr. A. Pitlik)

*Ha, lago de Mácha, la amopoet'!
„Kun mi en la barkon rapidu,
mi vian hararon orblondan, knabin',
trempiĝi ne lasos — min fidu!*

*Estante pelata de milda zetit',
balance moviĝos la barko,
fabelon mi volas rakonti al vi
pri amo kaj unu monarko.“ —*

*La koron konfidis al mi la knabin',
feinoj dancante nin lulis
kaj en la mistere ondanta nivel'
arbaroj sin klare spegulis.*

*„Ho, kisu min, knabo, kisadu min plu,
ve pri la perditaj momentoj,
la celon maltrafus ja nia dezir'
sen amo, sen larmoj aŭ sentoj.“ —*

*Kapturnon sentante, revenas la du
al urbo, ebriaj de amo. —
Sur lago de Mácha, sub Bezděz-kaste'
buntigis ilia programo...*

El ĉefa manuskripto trad. M. Lukáš.

LINGVO

Překlad úkolu 9.

La sopiro al la paco¹ kaj la timo² pri la paco plenigas hodiaŭ ĉiujn korojn, turmentatajn dum jaroj kaj precize,³ jam dum jardekoj, de timo, subpremado kaj milito. Se nenio alia, do jam la simpla⁴ rememorado pri la nigraj kaj senfinaj tagoj de mallibereco devus fratigi⁵ ĉiujn nin, kiuj vivas sub la komuna nacia tegmento kaj premiĝas⁶ ĉe la komuna nacia tablo. La sopiro al la paco estas sopiro al feliĉo, sed ne al tiu kaprica feliĉo renkontanta, kiun ĝi volas, kaj preterpasanta alian laŭ sia volo — ĝi (pli) precize estas sopiro al tiu feliĉo, kiun ĉiu el ni kreas aŭ almenaŭ kunkreas.⁷ Milito kaj paco estas verko de homoj, ne natur-katastrofoj.⁸

Ni demandu unu la alian afable⁹ kaj ni demandu ĉiu sin mem severe, ni demandu ĉiun tagon kaj precipe ĉi tiun tagon, ĉu¹⁰ ĉiu el ni faras ĉion, kion li povas fari, por ke estu inter ni sufiĉe da aktiva¹¹ amo, sufiĉe da fido¹² kaj ankaŭ sufiĉe da komuna laboro.¹³ Sen amo, fido kaj kunlaboro la homa vivo estos ĉiam malpli homa kaj fine ĝi estos malhoma. Ĉu sub nia nacia tegmento kaj ĉe nia nacia tablo ne estas senkaŭze¹⁴ tro da nubmienaj¹⁵ fruntoj kaj fermitaj pugnoj?¹⁶ Estu en la ĉeŝa lando blanka tago kaj amaso da rozoj¹⁷ ĉirkaŭe — en tiu verso de Neruda estas ne sole bildo de la paco, en ĝi estas ankaŭ ĝia kondiĉo.¹⁸ Fari¹⁹ el la vivo serenon²⁰ kaj florojn — neniu kapablas sola²¹ plenumi tiun taskon. Ni povas ĝin plenumi po-etape²² kune.

Per kunlaboro ni atingos pacon nur tiam, kaj nur tiam ni la pacon certigos²³ per kunlaboro, se ni ne kontentiĝos per²⁴ kunlaboro sole teknika, ekonomia, politika kaj ŝtato-defenda, sed se ni reprenos la fortojn²⁵ ankaŭ por kunlaborado spirita kaj morala, se en la babilona²⁶ konfuzo ni denove trovos almenaŭ komunan lingvon de konscienco kaj racio.²⁷

Interkonsenti²⁸ pri tio, kio estas bona kaj kio malbona, kio estas laŭcela²⁹ kaj kio ne, tio estas sufiĉe malfacila, sed ĝi estas ebla, se nur ekzistas efektiva volo interkonsenti pri tio kaj resti poste en la trovita³⁰ vero, estu trafita kiu ajn. Sen tia volo la kunlaborado estas nur ŝajna, sen tia volo la paco estas nur ŝajnigata. Ĉu ne estas ĝuste en tio la kaŭzo, kial la milito jam finiĝis, sed la paco ne jam komenciĝis? Kaj konstante ni memoru, ke la paco ne fondiĝas³¹ nek sekuriĝas per packontraktoj,³² konstante³³ ni memoru, ke la paco estas pli ol nemilitado.

Poznámky k 9. překladu:

¹ pri la paco, je la paco; ² antaŭtimo; ³ verdire, fakte, propre; ⁴ sola, nura; ⁵ interfratigi; ⁶ sin premas; ⁷ kies kreanto aŭ almenaŭ kunkreanto ĉiu el ni estas, de kiu ĉiu el ni estas kreanto aŭ...; ⁸ mir nelze pokládat za katastrofu, autor chtěl asi říci „přírodní zjevny“; ⁹ bon-vole; ¹⁰ děl-li = zda dělá: ĉu; se ĉiu el ni faras = jestliže každý z nás dělá; ¹¹ efika; ¹² konfido; ¹³ kunagado; ¹⁴ senbezone, nenecese; ¹⁵ malserenaj, koleraĵ; ¹⁶ pugnitaj manoj; ¹⁷ plene da rozoj, plenpleno da rozoj; ¹⁸ antaŭsupozo, premiso; ¹⁹ farigi = dáť udělat; ²⁰ helon; ²¹ nenies kapablo sufiĉus; ²² iom post iom, pograde; ²³ sekuriĝos; ²⁴ pri; ²⁵ se ni rekolektos la fortojn por; ²⁶ babelaj; ²⁷ prudento; ²⁸ interkompreniĝi; ²⁹ celtrafa, taŭga; ³⁰ ekonomita; ³¹ ne kreiĝas, ne estas kreata nek sekuriĝata; ³² packonvencioj; ³³ ĉiam, senĉese. (Hm.)

Překlad úkolu 10.

Moralan respondecon de tuta nacio por¹ la agoj de iuj el ĝiaj membroj² oni ne povas esprimi³ per ia mallonga formulo. Ni rememoru, ke⁴ en la komenco⁵ de la Hitlera militiro kontraŭ la homeco⁶ oni faris ĝeneralan diferencon⁷ inter la germaneco kaj nazieco, inter la popolo de Goethe kaj Schiller — de Himmler kaj Rosenberg. Oni atentigadis pri⁸ la iamaj milionoj⁹ da voĉoj socialdemokrataj kaj komunistaj, kaj oni atendis, ke la germanaj soldatoj kun tia opinio¹⁰ ne batalos kun Hitler, sed transkur(ad)os¹¹ al la alia¹² flanko de la fronto. Sed tio ne okazadis! La germana soldato „obeis la ordonon“ kaj tenis la germanan fronton ĝis ĝia frakaso. Dizertado estis do sporada¹³ kaj la „vek-iginta konscienco“ de la generaloj kaptitaj en Stalingrad, radioparolis¹⁴ al la plubatalantaj germanoj malfrue kaj vane. Kaj, sekve,¹⁵ la publika opinio de la tuta mondo ĉesis fari distingon inter la nazismo kaj germaneco: la morala respondeco por la barbareco¹⁶ de la nazistoj¹⁷ estis kontita¹⁸ al tuta germana popolo: Kiu silentas, tiu konsentas, kaj la plej granda parto¹⁹ de la germana popolo ne sole silentis, sed eĉ kune batalis, kaj ĝia kunkulpo pri ĉio, kion la dua „germana milito“ alportis, estas sendisputa. (Dr Jos. Macek en Naše doba (Nia tempo), aprilo 1947.)

Poznámky k 10. překladu:

¹ pri...; ² iuj ĝiaj membroj; ³ estas neeble esprimi, ne eblas esprimi; la respondeco ne estas esprimebla per...; ⁴ kiel; ⁵ komence de...; ⁶ humaneco; ⁷ ĝenerale oni faris diferencon, oni diferencigis; ⁸ oni montris al...; ⁹ antaŭaj milionoj; ¹⁰ konvinko; ¹¹ transiros; ¹² kontraŭa; ¹³ la transkuroj estis izolaj, maloftaj; la dizertoj estis maloftaj, neamasaj; ¹⁴ ekparolis per radio; ¹⁵ kaj tiel...; ¹⁶ barbaraĵoj; ¹⁷ naziuloj, nazianoj; ¹⁸ alskribita, aljuĝita, atribuita; ¹⁹ konsiderinda parto. (Hm.)

Překlady úkolů 9. a 10. zaslali: Jar. Čížek, Praha; Jelínková Štěp., Praha; Jandík Rud., Černilov; Ing. Kochman, Praha; Fr. Kuba, Olomouc; Jarmila Kubásková, Staňkov; A. Macek, Pulgáry; D. Mrázek, Zlín; Ant. Pilař, Karlovy Vary; J. Procházka, Rajhrad; M. Wadasová, Olomouc; B. Weinerová, Hradec Král.; Jan Zdvihal, Týnec n. S.

Kromě nich překlad č. 9. zaslali: Fr. Doležel, Zlín; V. Francová, Praha; E. Grich, Poproč; Magda Jelínková, Brno; R. Preclík, Tábor; Jan Taraba, Radvanice; S. Valešová, Turnov; A. Vavrušová, Praha. — Překlad č. 10.: A. Harna, Sternberk; A. Jandík, Pardubice, a J. Kučerová, Hradec Králové.

Děkujeme jim všem za příjemnou spolupráci a těšíme se, že jejich příkladu budou následovat i jiní.

Vypracování úkolu 11.

Věty, uvedené v úloze 11., zní správně takto:

1. Čar (= pro tio, ke) li estas malsana, li morgaŭ ne iros al la lernejo (= en la lernejon). — Prvá věta je důvodová (kauzální), odpovídající na otázku: proč?, proto důvodová spojka čar. Příslovce morgaŭ samo obsahuje udání času, netřeba tedy pojem času označovat ještě koncovkou —n. Morgaŭ ukazuje do budoucna, proto iros. Předložka al sama označuje směr, proto další označení směru koncovkou —n je zbytečné; jinak tomu je u předložky en, která označuje jednak místo (en lernejo = ve škole), jednak směr (en lernejon = do školy).

2. Li kaj lia patro promenas en la ĝardeno. — Sia mŭže bŭti jen v doplŭku nebo pŕedmĕtu, ktery nĕco podmĕtu pŕisuzuje, nikoliv v podmĕtu samĕm.

3. Kial vi faris tion? — Cu uvádí vĕtu tázací jen tehdy, není-li v ní zájmeno nebo pŕislovce tázací. Ponĕvadž zde je tázací slovice **kial**, odpadá ĉu.

4. Li estis **trankvile sidanta** en la momento, **kiam** mi eniris la ĉambron.

5. Li diris al mi, ke li **skribos** la **leteron per** krajono, **sed** li tamen **skribis ĝin per** inko. — **Krajono**, **inko** oznaĉujŭ pŕostŕedek k psaní, pomoci ĉeho se píše, proto pŕedločka **per**, nikoliv **kun**, ktera oznaĉuje pospolitost. **Ĝi** zastupuje vĕc (letero), nikoliv osobu (li).

6. El la du fratoj Karlo povas kalkuli **pli bone**. — Na otázku **jak?** odpovídá pŕislovce, vztahujcí se ke slovesu (kalkuli bone), nikoliv pŕidavnĕ jmĕno (bona), ktery se vztahuje k jmĕnu podstatnému.

7. Li faris **konvinkan** paroladon. — Velmi ĉastá chyba: **konvinki** = pŕesvĕdĉiti je samo o sobĕ pŕechodnĕ, netŕeba transitivní pŕipony —**igi**.

8. Ĉu **via amiko** jam estas resaniĝinta? — U sloves na —**igi** nemáj smysl tvary rodu trpnĕho (—ata, —ita, —ota).

9. La tero **turniĝas** unu **fojon ĉirkaŭ** sia akso **dum dudek kvar horoj**. — **Turni** = **otáĉeti** (nĕco, nĕĉim) je sloveso pŕechodnĕ (transitivní), zvratnĕ **toĉiti se** = **turniĝi**. **Akso** vztahuje se k podmĕtu ve tŕetí osobĕ (tero), tedy pŕisvojovací zájmeno je **sia**, nikoliv **ĝia**. Pojem ĉasu je vyjádŕen uŝ slovem **dum**, **netŕeba** tedy **koncovky—n**, je to **zbyteĉná tautologie**.

10. Atentu, **por** ke vi ne **ŝalu** en la **puton!** — Ve vĕtách ŭĉelných, uvedených spojku **por** ke, uŝívá se slovesa na —**u**. Pŕisloveĉnĕ urĉení smĕru s **en** a —**n**.

11. Ne trinku la teon **tro varman!**

12. Ĉu vi posedas **multe da mono** (= **multan monon**)? — Na otázku **kolik?** odpovídá pŕislovce (multe), nikoliv pŕidavnĕ jmĕno (multa). Po pŕislovci **multe** klade se pŕedločka **da**. Pŕivlastek **multa** musí se shodovati se svĕm jmĕnem podstatným **mono** (multan monon).

13. Estis **varme**; la suno **brilis** la **tutan tagon**. — V neosobní vĕtĕ bezpodmĕtĕ nemŭže bŭti pŕidavnĕ jmĕno, vztahujcí se vŭdy ke jmĕnu, ale pŕislovce. Záŕiti = **brili**, ne ŝajni (zdáti se). Pŕisloveĉnĕ urĉení ĉasu vyjádŕí se **koncovkou —n**.

Podobnĕ zpracujte ŭlohu: Oni lernu per eraroj! bh.

Jestĕ k pŕekladu ĉ. 11.

Vypracování ŭlohy 11. zaslali s vŭkladem: D. Mrázek, Zlín; B. Weinerová, Hradec Královĕ a A. Harna, Šternberk; bez vŭkladu: M. Hromas, Hradec Královĕ, A. Jandík, Pardubice, Rud. Jandík, ĉernilov, J. Kubásková, Stankov, J. Kuĉerová, Hradec Královĕ, P. Macek, Pulgáry, J. Šoulák, N. Veselí, J. Zdvihál, Týnec n. Sáz.

K obdrŕeným vŭkladŭm poznamenáváme:

Rozeznávejte: Li kun sia patro (on se svĕm otcem) a li kun lia patro (on s jeho otcem = s otcem nĕkoho jinĕho). — Podobnĕ: Ĉu vi faris tion? (udĕlal jste to?) a Kial vi faris tion? (pŕoĉ jste to udĕlal?). — Mi eniris la ĉambron (veŝel jsem do svĕtnice) je správnĕ, není tŕeba opakovat pŕedločku en (en la ĉambron). — Pŕi ĉislovkách základních obyĉejnĕ nemusí bŭt ĉlen, když jde o osoby a vĕci kterékoli (du fratoj — nĕjací dva bratŕi), ale mŭže bŭt ĉlen, jde-li o osoby neb vĕci urĉité (la du fratoj — ti dva bratŕi); samozjejmĕ místo ĉlenu mŭže, ale nemusí, bŭt

zájmeno urĉité (tiuj du fratoj, ambaŭ fratoj). — Správnĕ je resaniĝita i resaniĝinta, jen resaniĝita je nemožnĕ. — Správnĕ je unufoje i unu fojon. — Správnĕ je turniĝas i turnas sin. — Posedi multon da mono (nikoli multo), multe da mono, multan monon. Paroli konvinke, ne konvinkige ani kredigite.

Všem díky za zájem a ŭĉast! Vytŕvejte!

Z Hradce do Hradce pŕes Prahu posílá pŕjev obdivu a díkŭ za báseň ve 4. ĉísle „Esperantisty“ B. Weinerová p. prof. Lukášovi. Pŕipojujeme se, také se nám velmi líbila. bh.

ŭkol 12.

Oni lernu per eraroj!

Neniu homa verko estas senerara, ĉar ĉiu homo estas erarema. Tial unu specialisto povas kritiki la alian, unu povas riproĉi erarojn al la alia kaj ili ambaŭ povas esti bonaj specialistoj. Ankaŭ lernolibro ne povas esti sen eraroj, tamen ĝi povas esti bona, se la eraroj ne estas gravaj kaj multaj. La aŭtoro kaj la legantoj certe ĉiam danke akceptos atentigojn pri eraroj nerimarkitaj de ili kaj ĉiu povas lerni kaj perfektigi siajn sciojn laŭ riproĉataj eraroj.

El unu bona lernolibro ni citas propoziciojn ne ĉiam perfektaj (eĉ se ne eraraj) kaj la tasko de niaj legantoj estas trovi erarajn esprimojn kaj klarigi la erarojn. — Jen via tasko:

1. Inter Buda kaj Pest fluas la Danubo. — 2. La laboristo manĝis la paprikon. — 3. Karlo estas la frato de Margareto. — 4. Sinjoro instruisto faras skandalon, se mi ne scios la poemojn. — 5. Ĉu vi volus loĝi en la luno? — 6. Mi ofte vojaĝas sur la aŭtomobilo. — 7. Mi vizitus la teatrojn kaj kinojn. — 8. Sidu en la benkon! — 9. Ne staru sur la fenestron! — 10. Kial laboras la ŝoforo en la garaĝo kaj ne en la drogerio? — 11. Sia ĉambro estas sur la dua etaĝo. — 12. Ni konstruos familian domon en la vilaĝo apud nia urbo. — 13. Tie ni manĝos matene la matenmanĝon. — 14. Ni manĝas pomon, ja ni estas mal-sataj. — 15. Ponto kondukis tra la rivero. — 16. Ni sidis al la tablo. — 17. La vetero estas ofte kaprica, kiel mem la homo. — 17. Razilon posedis nur la edzo, ja lia edzino ne havis lipharojn. — 18. La kudristinoj ne estis tro sanaj, ja ili ne povis multe promeni. — 19. Si vizitis nin; ja proksimiĝis kristnasko. — 20. Moderna magazeno konstruiĝis apud pompaj palacoj. — 21. Ni ŝtopis nian stomakon per varma kafo. — 22. Kie estas la komenco, kie la fino de la Danubo? — 23. La historiistoj parolu multe pri la revolucioj, ja ili estas gravaj partoj de la historio! — 24. Mi volonte legas la novelojn kaj la romanojn. — 25. Tragedio estas, kiam la aktoroj faras en la teatro skandalon, kiun la homoj rigardas. — 26. Mi estas lernema; ja mi ŝatas lerni ĉion. — 27. Si estas labor-ema; ja ŝi laboras de mateno ĝis vespero. — 28. Vi estas estiminda, ja vi estas moderna pedagogo. — 29. Ili staris antaŭ palaco, kiu konstruiĝis en klasika stilo. — 30. La muzeo konsistas el dudek klasoj. — 31. Ja la naturo estas belega, sed artistoj plibeligas ĝin. — 32. Ili vojaĝis sur la tramo. — 33. Ili eksidis en malgranda parko. — 34. En nia urbo malfermiĝis muzeo. — 35. La elefantoj faris skandalon, se iu volis trompi ilin. — 36. Pedagoĝoj devus komenci la instruadon de la bestoj. — 37. Feliĉe tiuj ruinoj jam ne ekzistas. — 38. Sur la koridoroj preĝis la monaŝinoj. — 39. Studentoj vojaĝis sur aŭtobuso. — 40. La arbojn prizorgis mem la laboristoj. — 41. Turkoj regis sur la mezo de la lando. — 42. Edmondo marŝis tra mon-

toj kaj valoj. — 43. Junuloj kolektiĝis en la halo. — 44. La viro de ordo jen ekparolis al li: ... — 45. La vinbero estis kara, ja ankoraŭ ne alvenis la vinbera sezono. — 46. La libro presiĝis en rusa lingvo. — 47. En la familio li estis la familiestro. — 48. Li estis kredema persono, ja li kredis eĉ nekredoblan historion. — 49. Cigaringon

li ne havis, ja li ne fumis. — 50. Kiam ekmarŝis la morto, li ne timiĝis.

Vian kritikon, korektojn kun argumentoj ni publikigos en la venonta numero, se vi ĝin sendos antaŭ la 20-a aŭgusto. — La plej bona laborinto ricevos kiel premion libron. bh.

RICEVITAJ LIBROJ

Julie Ŝupichová: Esperanto. Mlunvice a cviĉebnice pro samouky a kursy. Vydání páté, přepracované. 1947. Nákladem Šolce a Šimáčka, společnosti s r. o., v Praze II., Spálená ulice 29. Stran 126, 21×15 cm. Vytiskla tiskárna Jaroslav Strojil v Přerově. Cena Kčs 28,—. — Aŭtoro páté vydání skutečně přepracovala, takže vznikla učebnice, jež překonává vydání dřívější. Celý materiál je rozdělen do 242 krátkých odstavců tištěných borgisem a kursivou. Každý odstavec má kursivový titul podtržený. Typy písmen jsou ladné a celá sazba pečlivá. Typografická úprava pro učebnici určenou samoukům je velmi důležitá, proto o ní mluvíme hned s počátku. Dva druhy typů je však pro učebnici tak rozsáhlou málo. Bylo by bývalo dobře, kdyby se bylo mohlo použít ještě petitu a někde silných typů. Ale jako celek je knížka vypravena velmi pěkně. Obálka zasluhuje zvláštní poznámky pro vkusný, prostý vzhled, není na ní ani zemkoule ani černoch s Čínanem, měla by však být aspoň z tuhého papíru.

Methoda navrhovaná tomu, kdo se bude podle knížky učit, doporučuje, aby se naučil paragraf po paragrafu a nepostupoval dále, dokud předešlé odstavce zcela neumí. To se také zdůrazňuje v textu knihy. Rozvrh knihy k tomu nutí tím, že u ní není slovník slov v knize užitých, i že rejstřík je poměrně stručný, takže zapomenutá slovíčka i pravidla budou se hledat poměrně dosti těžko. Ale velmi přehledná úprava textu to koriguje. Učebnice je velmi podrobná a velmi svědomitě sestavená. Aŭtoro použila různých nových příkladů. Pochválili bychom na př. odstavec 194 nebo odstavce 172 a 175. Přehlednutí je nepatrné. (na př. na str. 102 „měkký“). Velmi chválíme, že učebnice Ŝupichové je sestavena zcela jinou methodou než Kilianova. Tím je dána znamenitá možnost výběru pro ty, kdo se rozhodli učit se. Obě učebnice se také hodí pro hromadné učení v kursech a ve školách. Velmi doporučujeme jejich rozšiřování. Naše knihkupectví je dodává obratem.

Julie Ŝupichová: Hovoříme esperantsky. (Esperanta konversacio). Vydání druhé, přepracované. 1947. Nákladem Šolce a Šimáčka, společnosti s r. obm. v Praze II., Spálená ulice 29. Stran 132, 21×15 cm. Vytiskla knihtiskárna Jar. Strojila v Přerově. Cena 28.— Kčs. — Toto nově vydané autorčiny „Knihy česko-esperantské konversace“ z roku 1925 je kniha téměř nová. Aŭtoro provedla důkladnou revizi zvláště esperantských textů jak po slovníkové tak po stylistické stránce. V devatenácti kapitolách je 1473 vět, někdy velmi pěkných obsahově a námětem. Jejich temata jsou vesměs z běžného života, takže se přichází na slova a rčení nejvšednější a velmi rozmanitá. Překlady esperantské jsou ekvivalentní, ale ne vždy doslovné. To je velmi správné, neboť tak se naučí čtenář dobrému stylu esperanta. Vznikla tu knížka, v níž pečlivě a pozorně listování nelze dost doporučit tomu, kdo ukončil elementární kurs. Zopakuje si látku a rozšíří si svoji zásobu slovní i frazeologickou a to způsobem příjemným a zábavným. Obsah těchto nenáročných větíček přímo udržuje zájem, aby se listovalo a četlo dále a ne jednou. Kniha má předmluvu prof. Miloše Lukáše, který začíná vzpomínkou na svou rozmluvu před pětadvaceti lety s profesorem V. Tillelem, kdy tento znamenitý vševěd v literatuře, estetice a sociologii hodnotil kladně své zkušenosti o esperantském bratrství. Žel, že tehdy projevil Tille, v jiných oborech tak aktivní, v našem usilování aktivitu malou. Prof. Lukáš končí svou předmluvu přáním, aby tato knížka přichystaná neúnavnou apoštolkou esperantismu pomohla ozářit jednu z cest směřujících ke sbratření lidstva nebo aspoň jeho lepší části. My pak k tomu s potěšením dodáváme, že tato velmi ladně vypravovaná a nedrahá knížka rozmnožuje podstatně učebně pomůcky. Jež můžeme díky spolupráci našich obětavých odborníků už v druhém roce po válce zájemcům o esperanto nabídnouti. Obě knihy lze dostati ve všech knihkupectvích, naše je expeduje obratem.

Populara lernolibro de Esperanto. Internacia gramatiko por komencantoj. Verkis Ludoviko Kökeny. Eldonis Literatura Mondo (Rökk Szilárd-str. 28, Budapest VIII, Hungario) 1947. Pĝ. 64, 20×15 cm. Prezo 0.50 USA-dolaro plus 10% sendkosto, Kčs 27.50 ĉe Librovendejo de EAĈSR. — Tre bona ideo bone realigita: metoda pure esperanta kolekto da ekzemploj por kursanoj pri Esperanto en tiuj landoj, kie nuntempe mankas nacilingvaj lerniloj. Instruanto legas kun lernantoj ekzercajn esperantajn ekzemplojn kaj nacilingve ilin komentarias, klarigas gramatikajn regulojn kaj signifon de la vortoj, uzitajn en la leciono. La verketo de prof. Kökeny povas esti utila al ĉiu kurso de komencantoj de kiu ajn nacio, ĝi estas ankaŭ taŭga lernilo por radio-kursoj. Lingvo instruata estas ĝenerale bona; neeviteblaj eraroj estas ne-gravaj kaj nemultaj, faritaj kredeble sub influo de la gepatra lingvo. Riproĉebla estas troa, ofte malĝusta uzado de la artikolo, iomete strangaj uzoj de kelkaj vortoj (skandalo, studento, festeno, metropolo, ja), iom neĝusta aŭ nekutima uzo de prepozicioj (loĝi en la luno, marŝi tra montoj, veturi sur tramo, timi de vi, ponto tra rivero, transtera provinco), nerekomendinda uzo de neologismoj por komencantoj (retikulo) k. s. Etaĝo, tramo, koridoro, lando estas normale rigardataj kiel spaco, ne kiel surfaco, areo, sekve estas preferinde uzi antaŭ ili prepozicion „en“, ne „sur“ (en spaco, etaĝo, aŭto...), kie ne taŭgas „per“. Pli bona estas „jarcento“ ol „centjaro“, „esti konstruita“ ol „kostruiĝi“ (domo), „esti presita“ ol „presiĝis“ (libro). La aŭtoro prave evitas la kutiman uzadon de la konjunkcio „ja“ post la personaj pronomoj, sed malpli prave metas ĝin principe en la frunton de la propozicio (multloke), ĉar la plej natura kaj taŭga lokigo estas ordinare post la verbo. „Legendo pri sia vivo“ (37) verŝajne estas preterrigardita preseraro. Ne estas kaŭzo ne skribi: dekvarjara (unuverte) studento. Kelkaj naivaj frazoj estas tolereblaj kaj pardoneblaj. La subtitolo estas malprava, neĝusta, ĉar la verketo ne estas gramatiko. Ĝenerale la libreto estas tute rekomendinda. —ou—

La eterna evangelio. Sesa libreto. Eldonis Misia rondo. De Veteli. Suomi-Finnlando. 40 paĝoj, 14×11 cm. Broŝureto predikanta mistikan enprofundiĝon en ian kristanisman ekstereklezian. La versaĵoj kaj la prozaĵoj ne estas tro konvinkaj. Kiu ŝatas esti kunigita kun tiaspeca idearo, estas invitata turni sin al la prezidanto de la Rondo Kalervo Savola en Veteli, Finnlando.

Jarlibro IEL UEA, 1947, Unua parto. La enhavo de tiu ĉi jarlibro ne povas esti represata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de IEL. Copy-right by Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglio. Nur por uzo de membroj. Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo. Paĝoj 250. — La sopire atendata Jarlibro aperis en pli granda amplekso ol pasintjare en tradicie bela kaj bona aspekto. La kutimaj raportoj pri la movado aperis en la dua parto. Ni konstatas kun kontenteco, ke listo de Delegitoj en Ĉefoslovakio jam estas sufiĉe longa! Estas el nia lando 34 membroj kun jarlibro, 229 membroj-abonantoj, 8 membroj-subtenantoj. Nombroj kontentigaj, sed ne tro. Tre volonte ni vidus en la venonta jarlibro almenaŭ kreskon de Membroj kun Jarlibro. Sumo de individuaj membroj el la 65 landoj estas sole 5810, cifero certe ne impona! Kaj sole individuaj membroj, ne la Asociaj, povas garantiĝi enspezon de kotizoj kaj stabilecon de la organizo. Ciferoj pri la Asociaj membroj certe ankoraŭ estos korektitaj, ĉe nia Asocio ekz. temas pri malfrua trakalkulo de kotizoj, sed ankaŭ ĝenerale la nombro 9950 (kun kotizo ĉirkaŭ 5 Kčs poĵare) por la tuta mondo estas malalta. Se oni kalkulus membrojn de SAT kaj de la Katolika ligo oni

venus al sumoj same ne imponaj. Landaj asocioj aliĝintaj al IEL estas 17, nealiĝintaj estas 8. Tiuj modestaj nombroj signifas por ni sole: daŭrigi la laboron! La impona nombro el tiu cifero estas unusola: 65 landoj, en kiuj estas organizitaj esperantistoj. Kvankam estas malmultaj, ili estas en ĉiuj landoj. El Germanio estas enskribitaj sole 1 Membro-Abonanto kaj 2 M. dumvivaj, el Sovetio unu membro dumviva. Certe en Sovetio denove ekestos nova movado esperantista, en tempo ne tro malproksima. El Germanio oni jam aŭdas pri kursoj kaj provoj de nova organizo.

Kongreslibro de la XII-a kongreso de Flandra Ligo Esperantista, okazinta en Mechelen 24.—26. majo 1947. 44 pĝ., 13.5×21 cm. Por 2 respondkuponoj sendas la prez. de FLE dro T. v. Gindertaelen, Leopoldstr. 95 E, Mechelen. — Bele aspektanta libreto kun detaloj pri la kongreso. Ĝi havas tamen daŭran valoron pro la enestantaj interesaj artikoloj: Esperanto sesdekjara, Esperantisto (kun cito el Schulhof) kaj 11 pĝ. studo pri Mechelen (I. Historio; II. La Urbo; III. „La lunestingantoj“; IV. La sonorilaro; V. Meŝlenaj kontrabandistoj en la XV-a jarcento) kaj fine priskribo de la urbo Lier.

Agostinho da Silva, Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Tradukis J. J. Rodrigues. Eldonis Portugala Eldona Rondo, Porto, Portugalio. 24 pĝ. 12×17 cm, kvar bildoj. Unua kajero de la preparata popularscienca serio „Enkonduko en la kulturon“. Liveras EACSR por 7 Kĉs. Ses sinsekve eldonataj broŝuroj 34 Kĉs. Kvankam la historio estas konata, oni tamen kun intereso legos la priskribon de aventura vojaĝo, kiun en la jaro 1517 entreprenis kun kvin

ŝipoj kaj 265 viroj la portugala nobelo Magalhães, el kies ekspedicio revenis post kvin jaroj nur unusola ŝipo, la poreterne glora Vitória, kun 18 mortlacaj ŝipanoj. Ili la unuaj efektivigis la taskon, en kies sukceson la samtempanoj ne volis kredi, pruvante, „ke la tero estas randa, ke Ameriko estas aparta kontinento, ke vastega Pacifika oceano ĝin apartigas de Azio kaj ne estas plu aserteble, ke la kontinenta maso superas la oceanan.“ Sed la iniciatinto Magalhães mem pagis sian entreprenon per propra vivo. — La stilo estas simpla, konciza kaj streĉa. La traduko estas ĝojinde bona, oni trovas apenaŭ kelkajn makuletojn.

Světové či mezinárodní písmo fonetické (Tutmonda aŭ internacia literaro fonetika). Ni ricevis ĉeflingvan folion, sur kiu estas listoj de literoj, kiuj intencas esti sufiĉantaj por ĉiu lingvo. Ĝi malhavas ĉiujn supersignojn, la longeco de vokaloj kaj la moleco de konsonantoj estas signataj per ia (ne granda kaj ne ĉiam tre facile rimark-ebla ŝanĝo de la litero. La projekto tute malatentas internacian konvencion pri fonetikaj signoj. Ĝi volas malhavi signon por „y“ en slavaj lingvoj, kvankam prononco de „i“ kaj „y“ en ekz. rusa lingvo aŭdeble diferencas. Ankaŭ por „l“ estas unusola signo, kvankam fonetiko konas tri sonojn. La folion eldonis „Fonetika“ en Praha XI, Cimburkova 21.

Detruitajn Budapeŝton montras bela broŝuro eldonita en diversaj lingvoj de Fremdultrafika Oficejo en Budapeŝto V., Deák Ferenc u. 2. Por instigi ankaŭ esperantlingvan eldonon, postulu ĝin laŭ supra adreso.

INFORMOJ

Tutmonda Junular-Organizo okazigos dum aŭgusto 1947 internacian junularan kunvenon en angla Ipswich. Ĝia organo La Juna Vivo, kiu fariĝis ankaŭ organo de Internacia Instruista Kunlaboro, denove regule aperas.

Aŭstria Esperanto-Kongreso okazos la 29.—31. de aŭgusto 1947 en Kufstein, Tirolio. Partopreno por ni estos bedaŭrinde apenaŭ ebla, sed sendu almenaŭ salutleteron al Komitato de la Esperanto-Kongreso, prez. dro A. Huber, Kufstein-Zell, Tirolio, Aŭstrio.

Esperantistoj el USSR anoncas sin ĝis nun malofte, ĉar poŝta komunikado kun tiu granda lando ne estas ankoraŭ regula. Tial ni estis agrable tuŝitaj per letero veninta de samideano Volofiov el Moskva kaj ni volonte plenumas lian peton liveri al li nian gazeton. Li akceptu nian sinceran saluton kaj esprimon de espero, ke nia movado ekfloros baldaŭ denove en USSR.

En Hungario la laborista societo HESL kuniĝis kun HES en komunan Hungarlandan Esperanto-Societon. (Simila situacio estas fakte ĉe ni, ĉar granda parto de nia membraro estas laboristoj.) Junulara komitato de HES klopodas disvastigi Esperanton en ĉiuj junularaj movadoj de Hungario kaj peras kolektivajn leterojn por neesperantistaj junularaj organizaĵoj en Hungario. Por kunlabori ĝi serĉas kontakton kun similaj organizaĵoj ĉiulandaj, reprezentanto partoprenos antaŭvideble la Svedan Junlarkunvenon en Jurela, la Internacia festivalon junularan en Praha, la Bernan kongreson kaj kaj la Internacian tendaron en Ipswich. Interesuloj skribu al la afergvidanto S. Kassai, Budafok, Bérkocsi-u. 5. Hungario.

ESPERANTISTA VIVO

La 31. V. 1947 nia samideano Ludmila Tomanová en Havlíčkův Brod edziniĝis al s-ro Miloš Kříž. — Ni deziras al la junaj geedzoj feliĉan kunvivon.

Emil V. Müller, kunfondinto kaj multjara prezidinto de Klub malostranských esperantistů en Praha, festis la 26-an de julio sian sesdekan naskiĝtagon. Li, renomita muzikkomponisto, krom multaj eminentaj muzikverkoj komponis Esperanto-kanton al Zamenhova poemo „Preĝo sub la verda standardo“. Al sia bonkora, tro modesta amiko deziras multe da sano kaj forto en lia neprofitema laboro liaj multaj samideanaj geamikoj.

La 7-a numero aperos en septembro, ĝi havos sole 8 paĝojn, ĉar tiu ĉi havas 16 paĝojn.

Niaj korespondantoj bonvolu atenti, ke nomo de nia Asocio estas Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko kaj adreso de nia redakcio la sama kiel tiu de la Asocio: Praha XIX, Uralské náměstí 9. Informojn en la Jarlibro estas neprecizaj.

Karel Dostál Lutínov:

KRISTO — PLUGISTO

*Plugas mi kaj plugas
dum ĉiuj taghoroj;
plugas mi en montoj
kaj en val' de ĉi koroj.*

*Matene, vespere
plugas mi sufere;
la pied' doloras,
manon vundoj boras;
ŝvitas mia vango,
gute talas sango.*

*Semas mi la bonon,
sed rikoltas ŝtonon;
la mondo min mokus,
la semon sufokas;
kaj dum dumil jaroj
malgraŭ ĉiuj baroj
plugas mi kaj vokas.*

(Traduko de Fr. Vl. Lorenz en la poemokolekto *Diverskolora bukedeto*.)

NI LEGIS

Unuiĝo de IEL kaj UEA estis forte sopirata de esperantistoj. Almenaŭ oni povis tion konjekti laŭ tio, kion oni diris en la esperantista preso. Tuj, kiam la kunfandiĝo estis proklamita, oni jam ricevas cirkulerojn kritikantajn kaj proponantajn novajn solvojn de la „organiza problemo“. Nederlanda esperantisto el majo dediĉas el siaj 12 negrandaj paĝoj du al la „problemo“. Al ni ŝajnas tia konduto nesaĝa. Ni ne intencas paroli pri la organizado, sed esti organizitaj. Ni kunlaboros en nova UEA kaj klopodos ne dediĉi lokon al remaĉado de la organizaj teorioj. Tiuj teoristoj ŝajnas forgesi antaŭ ĉio, ke ni esperantistoj estas movado tre malforta laŭ la nombro da adeptoj. Tial la unuola problemoj estas kreskigi la nombron. Kaj ĝis nun neniu elpensis ian alian metodon krom la individua varbado. Ĝi verŝajne plej sukcese efektiviĝas per preso. Por tio estas grava helpilo organo de UEA. Sed ĝi devus esti almenaŭ tridekdu-paĝa pomonate. Sed tio bezonus almenaŭ 20.000 individuajn membrojn-abonantojn! Kiom da ili intencas aliĝi ekzemple sinjoro P. Pace eluzanta paperon por sencela multobligado de cirkuleroj, kvankam oni povus uzi tiun paperon por varbi ekzemple estintajn esperantistojn en Italio al nova vivo.

Espero Katolika alportas en sia junia numero tutpaĝan artikolon kun du bildoj pri Preĉan, la mortinta ĉefepiskopo de Olomouc. Ampleksa recenzo pri la nederlandlingva verko Vijf kunstalen (Kvin artefaritaj lingvoj) de d-ro W. J. A. Manders lasas al ni supozi, kiom da valora materialo ni povus ĉerpi el ĝi, se ni komprenus komplete la enhavon.

En Internacia Kulturo (nro 9, majo 1947) ni trovas la jenajn artikolojn pri nia lando: D-ro Edvard Beneš kaj Glorja datreveno. Fine kompletan kolonon pri „Ĉeĥoslovaka unuiĝo Sokol“.

La 12-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Mechelen akceptis rezolucion en kiu ĝi esprimas:

1. ĝojon pri la reunuiĝo de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado;

2. deziron ke UEA akceptu Flandran Ligon Esperantistan kiel plenrajtan landan Esperanto-Asociacion;

3. ree instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Organizaĵojn, neŭtralajn kaj ne-neŭtralajn, pristudi la starigon de tutmonda Esperanto-Instanco, kiu reprezentu senescepte ĉiujn esperantistojn.

Ni ne pensas, ke la sumoj de membroj estos poste pli imponaj ol estas la nunaj tre nekontentigaj. Ni pensas, ke tiu senĉesa parolado pri unueigo havas neniun sencon. Klopodu ĉiu en sia sfero, ke kresku la anaro, sed ne forgesu, ke tre proksimiĝas al ridindeco ĉiama sumigado de niaj dekoj da organizitaj samideanoj.

Pri la 82-jara esperantisto Frank Schmidt, vivanta nun en Abbotsford, Wisconsin, Usono, raportas Amerika Esperantisto nro jan.-aprilo 1947. Laŭ AE „lernis samideano Schmidt Esperanton en 1895 en Bohemio.“ Estas do unu el la plej malnovaj nialandaj esperantistoj, pri kiu ni tamen nenion aŭdis cetera.

Poslouchajte náš esperantský rozhlas!

Opakujeme doby vysílání s opravami chyb, jež se vloudily do výzvy v posledním čísle. Upozorňujte na naše vysílání své zahraniční přátelé! Denně z Prahy v 17,30—17,45 h. na krátké vlně 31,41 m a zároveň na (u nás dobře slyšitelné) dlouhé vlně 1935 m, a v 23,00—23,15 h. na krátké vlně 49,92 m. Mimo to v pondělí a ve čtvrtek na střední vlně Prahy I 470,20 m v 22,50—23,00 h. a v úterý a ve čtvrtek na střední vlně Ostravy 259 m v 22,50—23,00 h. Je to náš letní čas. Západoevropský čas (GMT) je o dvě hodiny méně.

Esperanta flago flirtas sur Akonkagua, plej alta pinto (7035 m) de la sudamerika montarĉeno Andoj. Ĝin fiksis tie Tibor Sekelj, longjara membro de la Esperantista Klubo Akademia en Zagreb. Samideano Sekelj laboras en Sud-Ameriko kiel ĵurnalisto. Li partoprenis kelksemajnan sciencan ekspedicion inter indianoj kaj unu rivero ĝis tiam ne konata ricevis lian nomon. Nun li grimpis sur Akonkagua jam la duan fojon kaj fiksis tien novan esperantan flagon anstataŭ la antaŭa, kiun li tie lasis ĉe sia unua supreniro. (Jugoslavia Esperanto-Gazeto, nro 2/1947.)

Monda Bonvol-servo — World Goodwill Service estas multobligata esper.-angla bulteno, eldonata duonmonate en Kanado (Ontario, Windsor, 16 Dominion Boulevard) propagandanta rifuzadojn de la militservo kaj pagado de impostoj per argumentoj neklaraj kaj nelogikaj. Ili citas Ghandi, Tolstoj, Thoreau, sed ŝajnas, ke ili ne finpensis iliajn idearojn sufiĉe profunde.

Slovník esperantsko-český je v tisku.

Slovník česko-esperantský znamenitého autora jeden nakladatel odmítl zatím tisknouti.

Abychom jeho vydání uspíšili, vypisujeme podle návrhu pracovní konference v Pardubicích

SUBSKRIPCI PO 100 Kčs.

Zájemci rače posílati objednávky s předplatným našemu knihkupectví v Praze XIX, Uralské náměstí 9 na účet psp. číslo 12.371!

Složenký si můžete vyžádati nebo použijte bianco-složenek!

Malmultekosta etika rimedo por ĉesi fumadon (aŭ cigaredojn aŭ cigaron aŭ pipojn) estas mendebila ĉe s-ano Svačina Fran, delegito de IEL, en Lanžhot 663, Moravio.

NI POVAS LIVERI:

Kardinalo Wiseman: FABIOLA, rakonto pri kristanaj katakomboj en antikva Romo. Tradukis E. Ramo. 436 pĝ, ilustrita. Broŝ. Kčs 86.—, bind. Kčs 135.—.

Sienkiewicz: KAPTITAJ EN NUBIO. Tradukis W. v. Zon. 120 pĝ. Kčs 40.—.

Ginz-Kamarýt: ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO. 466 pĝ, ilustrita. Broŝurita Kčs 220.—, en bela bindo Kčs 280.—.

Baur: SVISA ANTOLOGIO. Broŝurita Kčs 220.—, bindita Kčs 255.—.

Munthe: ROMANO DE SAN MICHELE. Broŝ. Kčs 150.—.

Kalocsay: ETERNA BUKEDO. Broŝ. Kčs 110.—, bind. Kčs 138.—.

Mendu per poŝta pagilo nro 12.371 „Svaz esperantistů ČSR, účet knihkupectví, Praha“ samtempe sendante la sumon!